der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

22. Jahrgang Nr. 139 (5/1986) ISSN 001 4-0619 30 Pf

Deklaracio pri la Rajto de la Popoloj je Paco

La Ĝenerala Asambleo aprobis la Deklaracion pri la Rajto de la Popoloj je Paco per la rezolucio 39/11 de la 12-a de novembro 1984, kiu estis akceptita kun rekorda nombro de 92 jesaj voĉoj sen iu kontraŭvoĉo ĉe 34 sindetenoj. La teksto estis ellaborita de **Bulgario, Kubo, Ekvatora Gvineo, Germana Demokratia Respubliko, Popoldemokratia Respubliko Laoso, Libia Araba Ĝamahirijo, Mongolio kaj Nikaragvo.**
En la sama rezolucio la Ĝenerala Asambleo petas la Ĝeneralan Sekretarion zorgi pri la plejeble granda disvastigo de la Deklaracio interŝtatoj, interŝtataj kaj neŝtataj organizaĵoj kiel ankaŭ inter aliaj konvenaj organizaĵoj.

Deklaracio

La Ĝenerala Asambleo

— konfirmante denove, ke la konservado de la paco kaj sekureco je internacia nivelo estas ĉefa celo de la Unuiĝintaj Nacioj,
— konsciante la principojn de la internacia juro fiksitajn en la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj,
— esprimante la volon kaj la sopiron de ĉiuj popoloj elradiki la militon el la vivo de la homaro kaj antaŭ ĉio malebligi mondvastan nuklean katastrofon,
— konvinkita pri tio, ke vivo sen milito estas la unua internacia kondiĉo por materia bonstato, evoluo kaj progreso de la landoj same kiel por la plena realigo de la rajtoj kaj bazaj homaj liberecoj, proklamitaj de la Unuiĝintaj Nacioj,
— konsciante, ke la kreo de daŭra paco sur la Tero en la nuklea epoko estas la ĉefa kondiĉo por la konservado de la homa civilizacio kaj por la transvivo de la homaro,
— rekonante, ke la konservado de paca vivo por la popoloj estas la sankta devo de ĉiu ŝtato,

1. **proklamas solene,** ke la popoloj de nia planedo havas sanktan rajton je paco;
2. **deklaras solene,** ke protekti la rajton de la popoloj je paco kaj progresigi ĝian realigon estas la baza devo de ĉiu unuopa ŝtato;
3. **emfazas,** ke la sekurigo de la praktikado de la rajto de la popoloj je paco postulas, ke la politiko de la ŝtatoj celu la forigon de militdanĝero, ĉefe de atoma milito, la rezignon je apliko de perforto en internaciaj rilatoj kaj pacan solvon de internaciaj disputoj per pacaj rimedoj sur la bazo de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj;
4. **alvokas ĉiujn ŝtatojn kaj internaciajn organizaĵojn** fari sian plej eblan por subteni la praktikadon de la rajto de popoloj je paco per apliko de taŭgaj paŝoj je nacia kaj internacia niveloj.

La Kongreso sub azia suno

Dum la lastaj jaroj la esperantistaro sekvis kun granda interesiĝo la fortan reevoluon de la Esperanto-movado en Popola Respubliko Ĉinio. Kiam antaŭ kelkaj jaroj ĉinaj respondeculoj anoncis la planon organizi Universalan Kongreson en Pekino, eble multaj ne tute kredis la anoncon. Kaj tamen, la ĉinaj esperantistoj realigis sian planon.

De la 26a de julio ĝis 2a de aŭgusto 1986 en la ĉefurbo de Popola Respubliko Ĉinio, Beijing, okazis la 71a Universala Kongreso de Esperanto. Partoprenis ĝin pli ol 2400 kongresanoj el 54 landoj. Ĉi-tiu kongreso, kiel substrekis ĉinaj aŭtoritatuloj, estis la plej granda internacia kongreso iam ajn organizita en Ĉinio. Kaj ĝi estis la plej granda UK ekster Eŭropo. Do atentindaj rekordoj. La kongreso havis la kadran temon „Interkompreniĝo — paco — evoluo" kaj volis esti kontribuo al la Internacia Jaro de la Paco. deklarita de Unuiĝintaj Nacioj.

1. La inaŭguro

Dimanĉe, la 27an de julio, okazis la eksterordinare impresa inaŭguro. Partoprenis multaj eminentaj personuloj el la politiko kaj kultura vivo de Ĉinio. La Alta Protektanto, **Peng Zhen,** prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso (= Popola Kongreso) ne povis persone partopreni. Sed multaj membroj de la tre prestiĝa Honora Komitato de la Kongreso ĉeestis, ĉefrunte la du vicprezidantoj de la Popola Kongreso **Huang Hua** kaj **Chu Tu-nan.** Ambaŭ faris signifoplenajn paroladojn kaj tre forte substrekis la valoron de Esperanto en la batalo de la paco. Ili elstarigis la tradiciojn de la Esperanto-movado en Ĉinio, tradiciojn, kiuj estas intime ligitaj kun la popolliberiga batalo de la 20aj kaj 30aj jaroj. La vicurbestro de Pekino, honora prezidanto de Pekina Esperanto-Asocio, eĉ faris sian alparolon en Esperanto. En tre bona konciza parolado la vicprezidinto de UEA kaj nun novelektita prezidanto, **prof. Humphrey Tonkin** (rektoro de la Universitato Potsdam/Novjorko) tre klare montris la intimajn rilatojn inter la tri partoj de la kongresa temo: interkompreniĝo — paco — evoluo. Al la inaŭgura etoso ankaŭ kontribuis ĉina harpistino kaj ĉina-bulgara koruso. Ankaŭ ĉi-jare denove multaj diplomatoj salutis la kongreson. Kiel reprezentanto de la ambasado de GDR en Ĉinio partoprenis ties aferŝarĝito s-ro **Eller.**

Delegitoj de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, kiuj aktive partoprenis la kongreson per multaj kontribuoj, estis la prezidanto de GDREA **Hans Heinel** kaj la sekretario **d-ro Detlev Blanke.**

2. La Kongrestemo

Verŝajne la plej bona resuma prezento ad la temo estis tiu de prof. Tonkin dum la inaŭguro. Se oni kredis, ke la temo ludis rolon dum la tuta kongreso, oni eraris. Bedaŭrinde nur unu tago, la „Tago de la Paco" estis dediĉita al pli profundaj diskutoj. Dum la ĝeneralaj konferencoj kaj dum la publika kunsido de Mondpaca Esperantista Movado estis la ebleco trakti la gravan temon. Multaj el la diskutintoj esprimis la neceson serĉi komunan bazon por malstreĉiĝo kaj malarmado, ĉar, kiel diris itala katoliko prave, ni ĉiuj sidas en unu boato kaj aŭ komune pereos aŭ komune saviĝos. Kiel estis decidite 1985 en Aŭgsburgo dum la 70a UK la „Tago de la paco" okazu ĉiujare. Espereble la temo de la paco ne nur estas traktata dum UK-oj okaze de ia Internacia Jaro de Paco. Ja la temo urĝiĝas pli kaj pli, tute sendepende de internaciaj UN'jaroj. Menciindas, ke dum la publika MEM-kuneno la partoprenintoj telegrame aldonis siajn subskribojn al la internacia kampanjo por malpermeso de ĉiuj nukleaj armiloj. La kampanjon iniciatis la Komitato Hiroshimo-Nagasaki.

3. Klerigaj programoj

La kongreson partoprenis pli ol 300 ĉinoj kaj 350 japanoj. Do tre senteblis la „azia komponento" de la kongreso, feliĉe en multaj aranĝoj.

La **Internacia Kongresa Universitato** okazigis sian 39an sesion sub la rek-

toreco de prof. Ye Junijan, eminenta verkisto kaj profesoro. Oni povis aŭskulti jenajn prelegojn:

— prof. d-ro Chen Yuan (Ĉinio): Popolo, lingvo kaj kulturo
— prof. d-ro Sinitirô Kawamura (Japanio): La reakcio de Maillard inter amino- kaj karbonilgrupoj en manĝaĵo kaj aliaj
— prof. d-ro Io Chou (Ĉinio): Papilioj venas
— prof. d-ro Jannes Markus Mabesoone (Brazilo): Resuma historio de la tero
— d-ro E. James Liebermann (Usono): Psikoterapio: Evoluo de post Sigmund Freud
— prof. d-ro Božidar Popovič (Jugoslavio): Popaŝa astronomia solvado de la glaciepoka enigmo
— d-ro Leszek Kordylewski (Pollando): Interno de la ĉela membrano
— d-rino Daniela Deneva (Bulgario): Interna strukturo de la tero laŭ sismologiaj donitaĵoj
— Li Shijun (Ĉinio): Enkonduko al studo pri ĉinaj popolaj kantoj
— d-ro Victor Sadler (Nederlando): Distribuita lingvo-tradukado (DLT): nuna stato kaj potencialoj.

Krome okazis la jam tradicia **esperantologia konferenco,** la 9a sesio. La prelegintoj aliris la kadran temon „Internacieco de Esperanto el neeŭropa vidpunkto". La konferencon gvidis d-ro D. Blanke. Prelegis: d-ro Dan Maxwell (Usono): „Ĝeneralaj homaj kapabloj kaj antaŭkonoj rilate lingvolernado", d-ro Julius Balbin (Usono): „Ĉu Esperanto estas latinida lingvo?", Ilona Koutny-Gill (Hungario): „Esperanto kaj la aglutinaj lingvoj", Kurisu Kei (Japanio): „Malfacilaĵoj de Esperanto por japanoj", Nagata Akiko (Japanio/Nederlando): „Lingvikaj vortoj de Esperanto, el vidpunkto de japanlingvano", d-ro Amri Wandel (Israelo): „La Lingvo Internacia el ekstereŭropa perspektivo".

La prelegoj kaj vigla diskuto montris, ke Esperanto estas ne same facile lernebla por eŭropanoj kaj azianoj, kaj ke oni entute estu tre singardema parolante pri la „facileco" de Esperanto. Ĝi estas ĉiam nur relativa. La tuta kongreso ja tre bone instruis al la eŭropaj esperantistoj nepre pli atenti la vidpunkton de aziaj esperantistoj, rilate lingvajn problemojn same kiel movadajn.

Kompletigis sin reciproke la esperantologia konferenco kaj la „Tago de la Lernejo", kiu traktis per prelegoj kaj diskutoj la temon „Kiaj estas la apartaj problemoj en la instruado de Esperanto en la oriento?" Dum la kunsido de Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj d-ro Blanke prelegis pri la nomo de la lingvo de Zamenhof. La teksto aperis sur paĝoj 105—112.

4. Novelektoj

La Komitato de UEA elektis ĉi-jare sian novan Estraron. Antaŭe necesis elekti la komitatanojn C, t. e. membroj de la Komitato de UEA elekteblaj pro apartaj fakaj aŭ aliaj meritoj por la Esperanto-movado kaj pro tio utilaj al UEA. Al la elektitoj ankaŭ apartenis **d-ro Blanke.** Oficiala membro de la Komitato flanke de GDREA estas ĝia prezidanto **Hans Heinel** (Komitatano A).

Post sufiĉe ardaj debatoj kaj tre malbona laboro de la Elekto-Komisiono oni povis elekti novan prezidanton kaj Estraron. El la du kandidatoj **d-roj Werner Bormann** (FRG) kaj **Humphrey Tonkin (Usono),** klare elektiĝis la dua kaj ricevis la konfidon de la grandega plimulto de la Komitato. Al la nova Estraro krome apartenas: **Yosimi Umeda,** vicprezidanto (Japanio); **Gregoire Maertens** (Nederlando, la antaŭa prezidinto); **d-rino Flora Szabó-Felsö** (Hungario), ĝenerala sekretario; **d-rino Barbara Despiney** (Francio); **Diccon Mastermann** (Britio); **d-ro Victor Sadler** (Nederlando); **prof. d-ro Otto Haszpra** (Hungario); **Jean-Louis Texier** (Francio).

5. Kulturo

Kompreneble la gastiganta lando diversmaniere montris sian specifan kontribuon. Ne nur per prelegoj dum la Internacia Kongresa Universitato. En la **libroservo** dominis la belegaj ĉinaj eldonaĵoj. En la **Ĉina Teatrejo** oni povis ĝui la „nacian vesperon" kun dancoj, kantoj, akrobataĵoj kaj parto de la fama pekina opero. Al japanino, kiu batalis por la liberigo de Ĉinio

(Verda Majo, t. e. Hasegaŭa Teru) **Spomenka Ŝtimec** el Jugoslavio dediĉis sian monodramon, prezentitan de **Vida Jerman.** Bela bunta historia panoramo estis „La silka vojo". Granda surprizo por multaj estis la koncerto de la bonega kanadanino **Joölle Rabu,** vere profesia kanzonistino, espereble ankoraŭ ofte aŭdota.

Por multaj la kongreso fariĝis kongreso de bankedoj. Pli ol 500 kongresanoj estis feste akceptitaj en la fama Popola Halo de Pekino de la vicprezidanto de la Popola Kongreso **Huang Hua,** kiu utiligis la okazon ankoraŭfoje esprimi sian grandan simpation por Esperanto. Sed al bankedoj ankaŭ invitis la vicurbestro de Pekino, la vicministro de la „Ŝtata Komitato por lingvo" **prof. d-ro Chen Yuan,** la direktoro de la fremdlingva librokomerca entrepreno, kie ekzistas aparta Esperanto-Sekcio. La Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto invitis la Komitaton de UEA k. s. Nu — la bankedoj ne nur ebligis konatiĝon kun la fama ĉina kuirarto sed ankaŭ donis eblecon por iom pli trankvilaj penso-interŝanĝoj. Pro teknikaj kialoj multe da tempo dum la kongresa semajno foruziĝis pro longaj busvojaĝoj kaj organizitaj temporabaj komunaj manĝoj. Sed tio verŝajne ne estis evitebla.

La ĉinaj esperantistoj laboregis kaj sukcesis: la 71a UK-o fariĝis granda sukceso. La jubilea kongreso 1987 okazos en Varsovio. Al Ĉina Esperanto-Ligo kaj ĉiuj kunsubtenintoj tre grandan dankon pro tiu ne tute facile organizebla kongreso en la plej multhoma lando de la mondo.

D. Blanke

Renkontingoj kun amikoj en Pekino kaj Sanghajo

Post la 71a Universala Kongreso de Esperanto la sekretario de GDREA, d-ro Detlev Blanke, laŭ invito de la Japana Esperanto-Instituto partoprenis internacian sciencan simpozion en Tokio (vidu p. 102).

Revene el Japanio li havis tre agrablan restadon inter esperantistoj de Ŝanghaja Esperanto-Asocio. Li prelegis antaŭ ĉ. 200 esperantistoj kaj neesperantistoj pri la monda lingvo problemo kaj pri la Esperanto-movado en eŭropaj socialismaj landoj (tradukita ĉinen). Aparte agrabla estis renkontiĝo kun la prezidanto de la Federacio de filozofio kaj sociaj sciencoj de Ŝanghajo, en kies kadro laboras la esperantistoj. La konata lingvisto prof. d-ro Luu Zhufeng kaj d-ro Blanke substrekis siajn kontentecojn pri la bone evoluantaj rilatoj inter Ĉinio kaj GDR.

La sekretario de la Ŝanghaja Esperanto-Asocio, s-ro Wang Minhao kaj la instruistino s-ino Qian Ming-qi, tre afable helpis al la gasto el GDR. En Pekino akceptis la sekretarion de GDREA s-ro Li Shijun, vicĉefredaktoro de „El Popola Ĉinio", kiu estis fine de 1985 en Berlin. Antaŭ ĉ. 30 membroj de la Pekina Esperanto-Asocio d-ro Blanke prelegis pri la Esperanto-movado en eŭropaj socialismaj landoj kaj respondis multajn demandojn. En Ŝanghajo kaj en Pekino li ĉie sentis la varman amikecon kaj gastamon de la ĉinaj esperantistoj. Al ili tre apartan dankon.

—e

La 71a en televido kaj radio de GDR

En la gazetaro de GDR aperis kelkaj bone videblaj informoj pri la 71a UK-o, ekz. en „Neues Deutschland" la 24an, 28an de julio kaj 4an de aŭgusto. Krome Radio DDR prezentis apartan raporton. La „Aktuelle Kamera" amplekse raportis (kun filmo) pri la kongreso en sia disaŭdigo de la 2a de aŭgusto 1986 vespere en ambaŭ programoj.

EKSTERA REZOLUCIO

La 71-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de 27. julio ĝis 2. aŭgusto, 1986, en Pekino, kun 2 482 kongresanoj el 53 landoj.

traktinte kiel kontribuon al la Internacia Jaro de Paco la Kongresan Temon „Interkompreniĝo, Paco, Evoluo",

emfazas la bezonon de efika internacia lingva komunikado en spirito de egaleco por interkompreniĝo inter diverslingvanoj kaj homoj kun malsamaj mondkonceptoj,

elstarigas la fakton, ke progreso de la homaro en la materia, socia, kultura kaj teknika evoluoj eblas nur sub kondiĉoj de daŭra kaj stabila paco bazita sur plena interkompreniĝo,

notas kun kontento la favoran eĥon kaj subtenon, kiun trovas la kongreso flanke de ĉinaj aŭtoritatoj en la registaro kaj en politika, kultura kaj scienca rondoj,

substrekas la fakton ke la internacia lingvo Esperanto povas efike kontribui al la pliprofundigo de la ligoj inter aziaj landoj kaj Azio kaj aliaj kontinentoj, kaj

alvokas al la registaroj, ke surbaze de la Rezolucio Res 23/11.11 de Unesko favore al la centjara jubileo de Esperanto ili donu apogon al la Internacia Lingvo kiel rimedo de internacia intelekta interŝanĝo, precipe por la scienc-teknika progreso de la evolulandoj.

INTERNA REZOLUCIO

La 71-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de 27 julio ĝis 2 aŭgusto, 1986, en Pekino, kun 2 482 kongresanoj el 53 landoj,

esprimante sian kontenton, ke la kongreso ne nur estis la plej granda internacia aranĝo ĝis nun okazinta en Ĉinio, sed ankaŭ la plej granda Esperanto-kongreso ekster Eŭropo,

konstatante, ke en Ĉinio kreiĝas nova potencialo de la nuntempa Esperanto-movado,

gratulante aparte la ĉinajn esperantistojn pro iliaj multflankaj kontribuoj al la internacia Esperanto-movado ĝenerale kaj al la kongreso specife,

alvokas al ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj subteni laŭ siaj ebloj la movadon en Ĉina Popola Respubliko kaj en aliaj aziaj landoj, precipe per disponigo de rimedoj por praktika utiligo de la lingvo,

substrekas, kunlige kun la supra alineo, la neceson de konscia kaj sistema aplikado de Esperanto en scienco kaj tekniko kaj aliaj fakaj kampoj, kaj

reapelacias al la landaj asocioj digne omaĝi la centjaran jubileon de Esperanto per organizado de apartaj jubileaj kunvenoj, aranĝoj, eldonaĵoj, ekspozicioj kaj aliaj agadoj.

Lusin en libro pri Beijing

En la eldonejo por fremdlingva literaturo Beijing 1985 en aperis en germana lingvo 210paĝa libro „Beijing — Hauptstadt der Volksrepublik China" (Beijing — ĉefurbo de la Popola Respubliko Ĉinio). Sur paĝoj 147 — 154 oni trovos ĉapitron pri la fama ĉina verkisto Lusin (Lu Xun) kaj la muzeo pri lia verko kaj agado, kiu ekzistas en Beijing. Por esperantistoj estas interese, ke sur p. 150 de la libro aperas foto de grupo de 11 esperantistoj antaŭ la sidejo de la Pekina Esperanto-Societo, farita la 23an de majo 1923. Sur la foto pozas Lusin apud Erošenko kaj ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj. Eble la ĉinaj esperantistoj povas identigi la personojn.

D. B.

Internacia socilingvistika simpozio en Tokio

Proksimiĝas la jubilea jaro de Esperanto, la centjariĝo de la internacia lingvo. En diversaj lokoj de la mondo pro tio okazas apartaj aranĝoj dediĉitaj al ĉi-tiu jubileo, ankaŭ en Tokio, Japanio. De la 5a ĝis 7a de aŭgusto 1986 tie okazis internacia simpozio sub la temo „Socilingvistikaj aspektoj de la Internacia Lingvo". Ĝin organizis Universala Esperanto-Asocio kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo Problemo. Aŭspiciantoj estis la Japana Ministerio pri Edukado, la Japana Nacia UNESKO-Komisiono, la Japana Federacio de UNESKO-Asocio kaj la granda konata gazeto „Asahi Sinbun". La simpozion partoprenis pli ol 200 lingvistoj, studentoj kaj aliaj interesitoj. La 12 prelegantoj traktis diversajn aspektojn de la monda lingvo-problemo kaj aparte de Esperanto. La organizintoj sukcesis inviti kelkajn elstarajn japanajn lingvistojn kaj konatajn specialistojn el diversaj landoj. Jen la prelegoj:

— prof. d-ro **Tanaka,** Katuhiko (Universitato Hitotsubashi, Japanio): „Ŝtataj lingvoj kaj internacia lingvo: memstareco de nefortaj etnaj lingvoj kaj perspektivo de artefarita internacia lingvo"
— prof. d-ro Humphrey **Tonkin** (rektoro de la Universitato Potsdam, Novjorko, Usono, prezidanto de UEA kaj de CED): „Esperanto kaj la angla lingvo: du lingvoj kun diversaj celoj"
— prof.d-ro **Chen** Yuan (direktoro de la Instituto pri Aplikita Lingvistiko ĉe Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, vicministro de Ŝtata Komisiono pri Lingvo, vicprezidanto de Ĉina Eldonista Asocio kaj de Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, PR Ĉinio): „Multlingva socio: interlingvo aŭ komunlingvo kaj internacia lingvo — specife pri ĉina situacio"
— prof. d-ro Paŭlo K. **Eguti** (Nacia Muzeo de Etnologio, Japanio): „Problemoj pri internacia lingvo el la vidpunkto de afrika mondo"
— prof. d-ro Helmar **Frank** (direktoro de la Instituto pri Kibernetiko ĉe la Universitato Paderborn, FRG): „Utileco de la Internacia Lingvo kiel pontlingvo kaj referenclingvo por edukado kaj scienca komunikado"
— prof. d-ro **Kanno** Hiroomi (Tokia Universitato por Fremdlingvaj Studoj, Japanio): „Kie situas la korea lingvo en la lingva edukado en Azio?"
— d-ro Peter G. **Forster** (Universitato Hull, Britio): Ĉu (artefarita) internacia lingvo estas revo neatingebla? Sociaj aspektoj de la Esperanto-movado"
— Mgr. Tibor **Sekelj** (geografo, verkisto, Zagreb, Jugoslavio): „Ĉu la socio bezonas la Internacian Lingvon?"
— Doc. **Gotoo,** Hitosi (Universitato Tohoku, Japanio): „Interlingvistikaj diskutoj en la historio de lingvistiko"
— **Zhang** Qicheng (ĝenerala sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, PR Ĉinio): „Pri la evoluo de Esperanto kaj lingva neŭtraleco"
— prof. Claude **Piron** (tradukisto, psikologo, Universitato de Ĝenevo, Svisio): „Nacieco kaj internacieco en Esperanto"

kaj el Germana Demokratia Respubliko prelegis d-ro Detlev Blanke, sekciestro en la ĉefsekretariejo de Kulturligo kaj sekretario de GDREA: „Socipolitikaj influoj kaj la Internacia Lingvo. Ĉu socisistemaj kaj politikaj-ideologiaj diferencoj reflektiĝas en Esperanto aŭ kreas lingvovariantojn?"

La prelegojn sekvis diskuto inter la prelegintoj respektive estis responditaj demandoj de la aŭskultantoj. La prelegoj aperos Esperante kaj japane en libro komence de 1987. La simpozio sendube estis digna kontribuo al la jubileo de Esperanto sed, pli grave, ĝi certe stimulos la sciencan esploron pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj problemoj en Japanio. Grandan meriton pri la okazigo de la simpozio havis s-ro Y. Umeda, vicdirektoro de la Japana Esperanto-Instituto kaj vicprezidanto de UEA. La simpozio okazis sub favoraj materiaj cirkonstancoj, tiel la partoprenintoj prelegintaj havis neniajn elspezojn por vojaĝado kaj restado.

D. Blanke

Gaste ĉe la 73a Japana Esperanto-Kongreso

Kiel partopreninto de la internacia simpozio en Tokio „socilingvistikaj aspektoj de la internacia lingvo", mi estis invitita post la simpozio veturi al Osaka por tie partopreni la 73an Japanan Esperanto-Kongreson. Ĝi okazis de la 9a ĝis 10a de aŭgusto 1986.

Aliĝis pli ol 300 japanoj kaj kelkaj eksterlandaj gastoj. La programo enhavis solenan malfermon, kunsidojn de la Japana Esperanto-Instituto, prelegojn, fakkunsidojn kaj kulturajn programerojn. Mi estis tre kore akceptitaj de la aktivuloj de Japana Pacdefenda Esperanto-Asocio, ties ĝenerala sekretario k-do Nanba kaj ties prezidanto k-do Kurita. Mi havis la eblecon saluti la kongreson en la nomo de GDREA, substrekante aparte la gravan laboron de la japanaj esperantistoj en la kontraŭmilita movado. En la kadro de la kongresa universitato prof. Chen Yuan (Pekino, PR Ĉinio) prelegis pri „Paŝoj al la reformado de literoj en Ĉinio" kaj mi mem pri „Specifaĵoj de la Esperanto-movado en kelkaj eŭropaj socialismaj landoj".

Pluaj prelegoj temis pri la fono de la UNESKO-rezolucio (Tibor Sekelj, Jugoslavio) kaj la Esperanto-movado en Ĉinio (Zhang Qui-Cheng, PR Ĉinio).

Aparte interesa kaj vigla estis la kunsido de la japana MEM-Sekcio, kiun partoprenis ne nur japanaj esperantistoj sed ankaŭ gastoj el Brazilo, ĈSSR, Hungario, Nederlando kaj GDR. La interŝanĝo de vidpunktoj pri la nuntempa internacia situacio kaj la eblaj kontribuoj de esperantistoj estis tre pensiga. S-roj Polak (ĈSSR) kaj Kumaki (Japanio) ĵus estis revenintaj de la monda konferenco kontraŭ nukleaj armiloj, okazinta en Hiroshimo kaj informis pri la rezultoj. La Japana Pacdefenda Esperanto-Asocio ankaŭ informis pri granda subskriba kampanjo por la malpermeso de ĉiuj nukleaj armiloj. Alvenis pli ol 200 000 subskriboj el multaj landoj. Pro la bonega ĉi-rilata laboro la organo de KP de Japanio „Akahata" en sia eldono de 25. 7. 86 amplekse informis pri la kampanjo sur la unua paĝo.

Mi krome havis la eblecon kunveni kun esperantistoj el Osaka kaj respondis iliajn multajn interesajn demandojn pri la vivo en GDR aŭ pri internaciaj problemoj. Mi estis tre kortuŝita de la gastamo de japanaj esperantistoj. K-doj Nanba (Osaka) kaj Akada (Kobe) eĉ tranoktigis min en ĉarmaj japanaj domoj, neforgeseblaj travivaĵoj.

Mi multon lernis dum mia restado en Japanio kaj nun pli bone komprenas la specifaĵojn de la japana Esperantomovado. Sendube mia restado helpos pliintensivigi la rilatojn inter japanaj esperantistoj kaj tiuj de GDR.

D. Blanke

Amikaj rilatoj al Ĉinio

Wanxian situas apud la fama „Jangzi"-rivero en la sudokcidenta parto de Ĉinio. La urbo, riĉa je bela naturo, estas ankaŭ ĉefurbo de la distrikto. Jen fondiĝis, je la 10-a de majo 1986, „Wanxiana Esperanto-Asocio". 55 lokaj eminentuloj ĉeestis la inaŭguron, tri el ili estas direktoroj en la kultura, vojaĝa respektive eduka burooj de la distriktaj administracioj. S-ro Hu Xiaochun estis elektita kiel prezidanto de la nova asocio. Du eksterlandaj esperantistoj estis ekceptitaj kiel honoraj prezidantoj, nome Joachim Schulze el Leipzig (GDR) kaj H. Noda el Nishinomiya (Japanio). Tion ĉi la anoj de la „Wanxiana Esperanto-Asocio" tre alte taksas kaj prenas kiel simbolon de la amikeco inter la popoloj kaj esperantistoj de GDR, Japanio kaj Ĉinio.

Hu Xiao-chun, Wanxian (Ĉinio)

Aldono de la red.: Intertempa la leipziga Distrikta Estraro de GDREA proponis al la nove fondita ĉina E-asocio interkonsenton pri amikeca kunlaborado, por levi la komunajn intencojn sur pli altan platformon.

Gratulon al Alice Schödl

La konata iama laborista esperantistino Alice Schödl el Neuruppin la 15-an de oktobro 1986 fariĝis-nekredeble! — 80-jara. Ni tre kore gratulas al la jubileulino dezirante ankoraŭ longe sanon kaj viglecon.

CE GDREA

Skribis Pola Esperanto-Asocio:
AL LANDAJ ESPERANTO-ASOCIOJ
AL ESPERANTO-GAZETARO

Estimataj!

Lige kun la letero de SAT sendita al la E-gazetaro (1986/03/26), kiu atingis nin en la fino de aprilo, ni estas devigitaj prezenti kelkajn faktojn kaj nian starpunkton, kion ni faras kun sincera bedaûro, ĉar ni esperis, ke SAT-Gvidantaro komprenas siajn mispaŝojn. La tekston vi trovos ĉi kune.

Samtempe ni uzas la okazon por informi vin, ke la preparlaboroj al la 72-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio en 1987 bone evoluas kaj post la lasta (en majo 1986) vizito en nia ĉefurbo de la ĝenerala direktoro de UEA, s-ro Simo Milojević, ankoraŭ pli vigliĝis. Laboras nova LKK, kies prezidanto estas elstara pola esperantisto, s-ano Stanisław Świstak, en la konsisto de LKK troviĝas kelkaj konataj agantoj de pola kaj internacia E-movado, kaj sciencistoj kiel doc. d-ro Marian Dobrzyński, d-rino Elzbieta Nawrocka, red. Andrzej Pettyn kaj red. Bolesław Staszczak el RADIO POLONIA, fakuloj pri siaj LKK-funkcioj ekz. mag. Elzbieta Wyrwicz (laborantino de la Ĉefa Komitato pri Turismo), Kalina Pieńkiewicz el la Pola Esperanto-Teatro kaj aliaj. Bone evoluas la kunlaboro kun la Pola Kulturministerio, vojaĝoficejo „Orbis" kaj Flugkompanio LOT, kiu eĉ promesis okazigi solenan dum kongresan nomigon de unu el la pasaĝeraj adiadiloj de LOT per la nomo LUDWIK ZAMENHOF, pretiĝas la kongresa kultura programo, ekskursoj,, informiloj ktp. Ĉio ĉi esperigas pri bona kongreso kaj tian ni vere dezirus realigi. Baldaŭ aperos la unua kongresa bulteno, sekvos la kongresaj komunikajoj.

Kun sinceraj salutoj en la nomo de la gvidantaro de PEA

Prezidanto de la Estraro
de Pola Esperanto-Asocio
mag. Inĝ. Włodzimierz Wesołowski
Varsovio, 1986/05/19

KIAL SAT NE KONGRESOS EN POLLANDO EN 1987?

La Plenum-Komitato de SAT dissendis al la E-gazetaro leteron, datitan 1986/03/26, laŭ kiu oni povas konkludi, ke SAT estas mirigita, ke „PEA ne plu subtenas" la projekton de SAT-kongreso en Pollando en 1987.

Ni rememorigu la faktojn. En 1983 okaze de SAT-kongreso en Linz — Pola Esperanto-Asocio prezentis al SAT la inviton kongresi en Pollando konforme al plejeble bonaj intencoj, ĉar en la Jubilea Jaro oni volis kongresigi en Pollando ĉiujn sincerajn amikojn de la patrujo de Esperanto.

Pasis jaroj, dum kiuj flanke de SAT-gvidantaro venis al PEA eĉ ne plej eta signo de interesiĝo pri la kongresado en Pollando en 1987. Tio ĉi jam povus esti sufiĉa kialo por veni al la konvinko, ke la inviton oni faris tro frue kaj sen konsidero al la veraj emoj kaj interesiĝoj de SAT-gvidantaro. Dume en la organo de SAT „Sennaciulo" pli kaj pli ofte komencis aperi artikoloj misprezentantaj kaj misfamigantaj Pollandon kaj aliajn socialismajn landojn. Cetere tiuj misprezentoj sekvis ne nur en „Sennaciulo", sed ankaŭ en aliaj SAT-eldonajoj frontloke kun „Sennacieca Revuo". Misprezentoj, glorigado de kontraŭsocialismaj opoziciaj tendencoj, evidenta enmiksiĝado en la internajn aferojn de Pollando, dubindigado de aliancoj de Pollando kun aliaj socialismaj ŝtatoj — jen mallonge dirite la linio de SAT speguliĝanta en Esperanto-revuoj de tiu organizo.

Ni rememorigu, ke apenaŭ kelkajn monatojn post la invito de SAT-kongreso al Pollando en „Sennaciulo" oni aperigis kontraŭpolландan artikolon „Ĉu la aglo tute cedos?" (decembro 1983), per kiu oni primokis la strebadon de poloj al la pacavoja rearanĝo de la situacio en la propra hejmlando.

Jen la „amika" dankesprimo de SAT pro la invito kongresi en Pollando! Alia ekzemplo de la starpunkto de SAT (oni ne diru, ke oni ne scias, kio aperas en la propra organo!) estis la artikolo „Pri konferenco de Jalto — 40 jaroj", tiom signifoplenaj por la evoluo de la postmilita paca situacio en Eŭropo. Strange, ke SAT oficiale deklaras sin por paco, sed ne volas rekoni la rolon de la decidoj de Jalto kaj Potsdamo por la firmigo de tiu paco!

Estas klare, ke ne la estraro de PEA, sed SAT mem per siaj unusignifaj paŝoj fermis al si la vojon al Varsovio en la Jubilea Jaro! Tia estas la vero kaj certe bone konscias tion la Plenum-komitato de SAT. Oni ne provu respondecigi pri tio polojn, kiuj ĉiam estis kaj estos gastamaj, sed neniam konsentos akcepti en sia hejmlando dubindajn gastojn. Estas bedaûrinda afero, ke la gvidantaro de SAT ne eltiris ĝustajn konkludojn el sia historio, ne lernis el la amaraj spertoj de la pasinteco. Domaĝe, ĉar en SAT estas ja ankaŭ valoraj iniciatoj kaj multaj respektindaj agantoj. Restas esperi, ke prudento kaj realecosento denove superregos en SAT kaj tiam venos la tempo, ke SAT ne nur povos kongresi en socialisma lando, sed eble eĉ disvolvi legalan agadan.

GVIDANTARO
DE POLA ESPERANTO-ASOCIO

Kiu fotis?

Mi serĉas diapozitivojn pri la 39-a IJK de TEJO en Debrecen kaj eventuale de 68-a UK de Esperanto en Budapest. Bonvolu turni vin al Siegfried Wagner, Am Alten Gothaer Weg 5, Waltershausen, 5812.

Detlev Blanke

Antaŭ la centjariĝo ekestas duboj . . .

„Esperanto" aŭ „Internacia Lingvo (ILo)" – Kiel nomi la lingvon?

1. Enkonduke:

Lingvo kun diversaj nomoj

Ekde kelkaj jaroj oni rimarkas la klopodon en certaj sciencistaj rondoj — imitatan de kelkaj esperantistoj — doni al la lingvo de Zamenhof novan nomon: Internacia Lingvo (aŭ mallongige ILo). Jam ekzistas iom da literaturo pri la problemo (vidu 8.).

Antaŭ la centjariĝo de Esperanto oni do trovos la paradoksan situacion, ke ne la neesperantistoj, sed iuj konantoj kaj uzantoj de la lingvo de Zamenhof mem komencas renomigi la jam per tradicia nomo provizitan lingvon. La afero estas pli grava ol povus ŝajni kaj tuŝas i. a. lingvistikajn, moralajn kaj scienctaktikajn aspektojn. La interlingvistiko (kiel ajn oni ĝin difinu) kaj la esperantologio ne povas ne havi starpunkton pri tio. Tio same koncernas la gvidantojn de la parolantaro de Esperanto (aŭ „Esperanto-komunumo", Esperanto-movado).

2. Kiu uzas la nomon „Internacia Lingvo"?

2.1. Dum pli ol 10 jaroj profesoro Helmar FRANK el Paderborn (FRG) konatiĝis per aro da interesaj artikoloj, kolokvoj kaj studoj i. a. pri la propedeŭtika valoro de Esperanto por la instruado de aliaj fremdlingvoj, pri instrumaŝinoj, planlingva dokumentada sistemo, lingvopolitiko, kibernetikaj aspektoj de interlingvistiko k. a. Sendube lia agado donis fortajn impulsojn al la apliko de Esperanto en la scienco. Li havas certan sukceson interesigi sciencistojn por Esperanto. Ankaŭ sur organiza kampo li tre multe laboras, fondinte diversajn internaciajn asociojn aŭ societojn.

Ĉi-tiu eseo ne havas la celon prijuĝi la agadon de profesoro FRANK. Pri diversaj de li reprezentataj sciencobranĉoj mi ne estas kompetenta. Temas pri FRANK pro tio, ĉar ĝuste li enkondukis novan nomon por Esperanto: „Internacia Lingvo" kun la mallongigo „ILo" kaj trovis imitantojn en Paderborn kaj aliloke.

2.2. Plue, sufiĉe grava estas la fakto, ke FRANK helpate de kelkaj aliaj sciencistoj sukcesis iniciati kaj proponi la fondon de la „Akademio Internacia de Sciencoj (AIS)" en San Marino. Tiu AIS oficiale fondiĝis fine de 1985. (FRANK-BÖHRINGER 1985) Ŝajne tiu ĉi institucio povus fariĝi eventuale iom serioza scienca afero, en kiu Esperanto ludos certan rolon. Pro tio estas alarmiga la fakto, ke en tiu ĉi institucio oni anstataŭis la nomon Esperanto per „Internacia Lingvo".

En la statuto de AIS, § 8 lingvoj, oni legas sub 8.1.: „La oficialaj lingvoj de AIS estas la itala lingvo, la Internacia Lingvo kaj la oficialaj lingvoj de UNESKO" (FRANK-BÖHRINGER 1985), 54). Sub „apendicoj" oni klarigas, kio estas „Internacia Lingvo". Oni legas en la sama verko, p. 59: „La nocio „internacilingva" same kiel la mallongigo I.L. en ĉi tiu statuto rilatas al la Internacia Lingvo aŭ „Lingvo Internacia" iniciatita fare de L. L. Zamenhof 1887. Ĉi tiu lingvo ricevis pli malfrue fare de la movado, kiu ĝin uzas kaj subtenas, la kromnomon „Esperanto". Kiam temas nur pri la lingvo kiel komunikilo senkonsidere la „interna ideo", kiu inspiras la Esperanto-movadon, sciencistoj ofte evitas la kromnomon „Esperanto", ekz. la „Someraj Universitataj Kursoj Lieĝo", la „Societo pri lingvolimtranspaŝa Eŭropa interkompreniĝo (Eŭropa Klubo)" kaj diversaj kibernetikaj organizoj. Ĉi tiuj ofte uzas la mallongigon en la gramatike fleksebla formo „ILo" enkondukita kadre de Eŭropa Klubo".

Do — el la malgranda rondo de paderbornaj sciencistoj la nova kutimo nun enpenetris en novan sferon. Ne mirige, kaj en la Paderborna rondo kaj en AIS la centra sciencisto estas profesoro FRANK.

3. Argumentoj de prof. FRANK

Prof. FRANK argumentas jene (FRANK 1980, 1/2):

3.1. „Ekstere de la uzantaro de la Internacia Lingvo ĝia pli malfrue enkondukita nomo ‚Esperanto' vekas sintenon de kontraŭstaro, kiu ĝuste pro la fakto, ke ĝi ne estas racie pravigebla, evitas diskuteblon kaj pro tio nur estas venkebla en maloftaj esceptaj kazoj. Almenaŭ en la rilatado kun laikoj oni rezignu je la pli nova nomo ‚Esperanto' (la kutima mallongigo: „E-o) kaj ekskluzive uzu la pli malnovan, sinoniman nomon ‚Internacia Lingvo' (la rekomendita kaj en la kibernetika-pedagogia verkaro jam kutima mallongigo „ILo"); alikaze oni serĉu pli bonan nomon."
En la citita manuskripto (FRANK 1980) li plue mencias jenajn kialojn, kiuj — laŭ li — pledas por anstataŭigo de „Esperanto" per „Internacia Lingvo" (aŭ ILo).

3.2. La fikso de nomoj estas arbitra, do ne akto de ekkonado sed de la volo.

3.3. La nomo „Esperanto" laŭ varbpsikologiaj vidpunktoj estas maltaŭga, ĉar origine temas pri pseŭdonimo de la aŭtoro, kiu ja „esperis", kion lingvo ne povas.

3.4. La nomo Esperanto asocias kun espero kaj tiel rilatas al la „interna ideo" de Zamenhof kaj liaj adeptoj. Ĉi-rilate FRANK skribas:
„La movado mem ĉefe uzas la nomon ‚Esperanto' kaj faras tion bone motivite, ĉar ĝi estas unuigita malgraŭ ĉiuj diversaj tendencoj ne nur per komuna lingvo sed ankaŭ per la ‚interna ideo', kaj tiu ideo estas multe pli forte vokita en la konscion per la nomo ‚Esperanto' ol per sobre se ne teknokrate sonanta nomo ‚Internacia Lingvo'" (FRANK 1985, 7).

3.5. Lige al la sub 3.1. menciita argumento, nome, ke multaj sciencistoj sentas racie ne klarigeblan kontraŭstaron kontraŭ Esperanto, kaj konscia pri la kontraŭstaro flanke de la movado kontraŭ la nomŝanĝo, FRANK (1985, 7) skribas: „Por la akceptigo de la Internacia Lingvo en scienco, pedagogio de fremdaj lingvoj kaj kulturpolitiko ne tiom gravas la akcepteblo de la nomo flanke de la ĝisnunaj uzantoj de ĉi-tiu lingvo sed unuavice la akcepteblo flanke de la nekompareble pli granda aro de potencialaj partneroj de komunikado".

3.6. En la menciita diskutmanuskripto li mencias, ke jam aro da institucioj aŭ ekskluzive aŭ paralele kun Esperanto uzas la nomon „Internacia Lingvo", tiuj estas:
— la Instituto por Kibernetiko (Paderborn)
— la Societo pri lingvolimtranspaŝa eŭropa interkompreniĝo (Eŭropa Klubo)
— la Internacia Kibernetika Asocio kun siaj kibernetikaj kongresoj en Namur.

Oni povus aldone mencii
— la Tutmondan Asocion pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko (TAKIS)

kaj la jam menciitan AIS (kp. 2.2.).
Ni detale prezentis la vidpunkton de FRANK por substreki, ke tute ne temas pri efemera kaprico de sciencisto sed pri sciencstrategie fundamenta demando, kiu postulas principan kaj detalan pritrakton.

4. Unuaj efikoj

La pli aŭ malpli sistema apliko de la „nova" nomo por Esperanto jam montras kelkajn efikojn.

4.1. Unue oni povas konstati necertecon ĉe kelkaj aŭtoroj. Ekz. la aŭtoro de la libro „Mein geliebtes Esperanto" (Gerlingen-Stuttgart: Bleicher-Verlag 1976 + 1978) Richard Schulz (Mia amata Esperanto) portas en la titolo de sia libro almenaŭ dufoje sektecan trajton. Ja sufiĉus la titolo „Esperanto", ke ĝi ankaŭ estas „mia" kaj „amata" kompreneble forpuŝos sciencistojn. Sed la sama SCHULZ (aŭ ŠULCO), klopodante iel akcepti la nomon „Internacia Lingvo" uzas ĝin en sia verko pri la eŭropa lingvo (SCHULZ 1979) ekz. ekde p. 83. Sed samtempe preskaŭ ĉiupaĝe oni trovas mencion de Esperanto.
Aŭ en alia verko (1985a) oni entute nur trovas la nomon Esperanto. En SCHULZ (1985b), kie temas pri la „scienceco de la Internacia Lingvo" (mi ne sciis, ke lingvoj povas esti „sciencecaj"), SCHULZ klopodas nur uzi „Internacia Lingvo", sed ne povas eviti paroli pri la „Akademio de Esperanto" (p. 32) kaj la esperantistaro

(p. 35). La malfacilo fariĝas eĉ pli evidenta en SCHULZ 1985c, kie li i. a. skribas „La atingoj de Esperanto rilate al instruiloj en la Internacia Lingvo mem kaj en multnombraj etnaj lingvoj ..." (p. 63). Sampaĝe ni legas kun surprizo: „Kaj fine kelkajn versojn de Zamenhof, kiuj pli bone ol ĉio alia kapablas montri, ke Esperanto ankaŭ estas lingvo de la koro". Krome, el la 7 cititaj verkoj de lia artikolo, 5 entenas la nomon Esperanto en la titolo aŭ eldonejo.
Do — necerteco kaj ŝanceliĝo ĉe unu aŭtoro. Nur ĉe unu?

4.2. Alia efiko almenaŭ foje jam konstatebla estas la konfuzo en neinformitaj rondoj de la amaskomunikiloj. Jurnalistoj jam havas malfacilaĵon objektive prezenti Esperanton. Ilia dilemo fariĝos ankoraŭ pli granda, se oni parolas al ili pri la „Internacia Lingvo". Belan pruvon por tio oni trovas en raporto de Paderborna Gazeto de 8. 11. 1980, kiu raportas pri „Europäischer Liederabend" (eŭropa kanzonvespero) kun Veselin Damjanov el Bulgario. Tie oni trovas „... seine (d. h. Damjanov — D. B.) Sympathie für eine übernationale europäische Verständigung brachte er durch Liedbeiträge in der **Esperantonahen Internacia Lingvo** zum Ausdruck" („... sian t. e. Damjanov — D. B.) simpation por supranacia eŭropa interkompreniĝo li esprimis per kanzonprezentoj en la **esperanto-proksima Internacia Lingvo",** (substrekoj miaj — D. B.).

4.3. Alia efiko estas jam konstateblaj negativaj reagoj flanke de ĝuste tiaj sciencaj aŭ administraj institucioj, kiujn oni volis gajni. FRANK (1980, 7—8) mem donas du ekzemplojn: „La publikaĵoj de la Instituto pri Kibernetika Pedagogio, Paderborn, direktiĝantaj ĉefe al neesperantistoj, pli kaj pli evitas la nomon „Esperanto" favore al la malpli forpuŝa nomo „Internacia Lingvo" aŭ ties mallongigo „ILo". Reage al tio, tute karakterize, la **kontraŭuloj** de la Instituto postulis eksplicite en la Centra Konsilantaro de la Esplorcentro FEoll, ke ĉe la prezento de esplorplano de la Instituto oni malkaŝe indiku ĉie tie, kie oni mencias la Internacian Lingvon, ke temas pri „Esperanto" kaj ke oni ne masku tion ĉe la decidorajtigitaj instancoj (Centra Konsilantaro, Kontrolkonsilio).
En la sama materialo (p. 8) FRANK eĉ raportas pri nete negativa efiko: „La Internacia Scienca Simpozio en Marilia 1979 interne uzis samrange la nomojn ‚Internacia Lingvo' kaj ‚Esperanto'. La kontraŭinterkonsente uzita nomo ‚Esperanto' per la loka gvidanto de la simpozio en letero al la ministerio en Brazilo rezultigis la blokigon de la jam promesitaj rimedoj kaj pro tio la financan fiaskon de la alivid-punkte eksterordinare fruktodona konferenco".
4.4. Kiel pluan efikon oni sendube povas mencii la kreskantan dubon ĉe pli kaj pli da interlingvistoj, esperantologoj kaj movadaj gvidantoj pri la seriozeco de la peresperanta scienc-aplika agado de prof. FRANK. Ĉiu ajn scienca agado, kie Esperanto ludas rolon, (ankoraŭ) ne povas havi daŭran sukceson sen la subteno de tiuj rondoj.
4.5. Mi tute konscie nur listigis kelkajn **jam konstateblajn** efikojn. Sendube oni povas imagi tutan aron da aliaj efikoj. Mi menciu almenaŭ unu. Verŝajne oni jam povas imagi necertecon aŭ eĉ kompletan konfuzon ĉe la dokumentado kaj laŭlingve ĝusta klasifikado de artikoloj pri kaj en la „Internacia Lingvo" (sen niencio de Esperanto). Ekzemple la bibliotekistoj ankoraŭ ne scias pri la identeco de la „Internacia Lingvo", ILo kaj Esperanto.

5. Komento pri la argumentoj de FRANK kaj kelkaj efikoj

En letreo de 9. 1. 86 profesoro FRANK skribis al mi, lige al la diskutata temo: „La argumentoj de ambaŭ flankoj (do por aŭ kontraŭ „Internacia Lingvo" — D. B.) ŝajne elĉerpiĝis sen esti konvinkintaj la koncernan kontraŭan flankon.. Post 30 jaroj oni vidos, kiu sukcesis".
Nu — mi tute ne samopinias kun prof. FRANK. Ŝajne, almenaŭ la argumentoj flanke de la kontraŭuloj de la maskigo ne elĉerpiĝis. Pro tio mi permesas al mi iom da komentoj pri la argumentoj de FRANK kaj pri la jam

konstatitaj negativaj efikoj.

5.1. FRANK (3.1.) sendube parte pravas asertante, ke „ekstere de la uzantaro de la Internacia Lingvo ĝia pli malfrue enkondukita nomo ‚Esperanto' vekas sintenon de kontraŭstaro".
Evidente la ĉefa kaŭzo de la klopodoj de FRANK ŝanĝi la nomon de Esperanto, estas taktika. FRANK ja volas enkonduki Esperanton en la sciencaplikan sferon, ĉar, kiel li multfoje substrekis per diversaspektaj sciencaj studoj, li estas konvinkita pri ties taŭgeco, perspektivo k. t. p. Kaj tiujn sciencajn kontribuojn de FRANK oni povas alte taksi. Do pri tio ĉi-tie ne temas.
Sed FRANK timas la kontraŭstaron de multaj sciencistoj, kiuj, aŭdinte la vorton Esperanto, tuj havas racie neklarigeblan kontraŭstaron kaj sekve ne pretas kunlabori. Sed FRANK nur **parte** pravas.

5.1.1. Kiel oni facile povas pruvi, tiu kontraŭstaro malkreskas proporcie al serioza agado de la esperantistoj mem. Verŝajne la aserto de FRANK estas principe grava por iuj okcidentaj landoj, kie Esperanto ludas tre malgravan kaj forte sektecan rolon. Sed jam en kelkaj socialismaj landoj, inter ili en GDR (kp. BLANKE 1985b), la situacio estas principe alia. Tie oni tute ne devas honti nomante la lingvon per la tradicia nomo, ĉar la agado de la esperantistoj estas ĝenerale pozitive akceptata. Kompreneble, per tio mi ne volas diri, ke ne ekzistas sufiĉe da kontraŭuloj en la menciitaj landoj, sed ilia nombro malkreskas.

5.1.2. Evidente FRANK ne sufiĉe okupiĝis pri la veraj kaŭzoj de la ja prave konstatita fenomeno. Ni aliloke menciis aron da kaŭzoj (BLANKE 1980/81 kaj 1985a, p. 14 — 17) kaj nur ripetas la ĉefajn, kiuj efikas komplekse, depende de la personoj kun antaŭscioj kaj filozofiaj konceptoj, de situacioj kaj — plej grave — de la agado kaj sinprezento de la esperantistoj mem:

1) La sintenoj de multaj lingvistoj — eĉ ĝis la nuntempo — estas influita de la organisma koncepto pri lingvo, kiun publikigis fine de la 19a jarcento August Schleicher. Tio signifas, ke oni komprenas lingvon kvazaŭ vivanta estaĵo, kiun oni ne povas bredi kvazaŭ homunkulo aŭ frankenŝtejnaĵo. Certe, temas pri metaforoj. Sed ili efikas ekkonobare.
2) Tre malhelpas la erariga terminologio, „artefarita lingvo, artlingvo, monda lingvo, helplingvo, universala lingvo" k. t. p. Oni devas distingi du grupojn a) nocioj kiel „universala, internacia, monda, helpa lingvo" indikas la komunikadan funkcion. b) „artefarita lingvo, planlingvo, natura lingvo" k. s. indikas la genezon, la ekestiĝon de lingvo.
3) Ne malofte oni identigas konkretan lingvon kun iu ideologio, kio fakte estas absurdaĵo kaj nur montras nekomprenon pri la socia karaktero de lingvo. Lingvo estas instrumento kaj la apliko-celo dependas plene de la homo.
4) Estas konate, ke planlingvoj ĝenerale estas faritaj de — laŭ lingvistika vidpunkto — laikoj. Nur Jespersen kun Novial (1928) kaj Gode kun Interlingua (1951) estis lingvistoj.
5) Tre negative efikas la diletanteca propagando pri Esperanto (sed ankaŭ siatempe pri Volapuko, Ido kaj aliaj sistemoj). Oni manipulas per supozoj, deziroj kaj duonveroj ekz. la milionoj da esperantistoj!). Oni parolas pri „internacieco", „facileco", „logikeco" k. s. ne difinante, kion oni komprenas sub tiuj nocioj. — Tio faras tre negativan impreson ĉe iom science penskapablaj homoj.
6) Aparte malhelpa estas la supertakso de la socisanĝa rolo de internacia lingvo. Ne malofte esperantistoj propagandas sian lingvon tiel, kvazaŭ ĝi povus interfratigi la homaron. La nebula „interna ideo" ĉi-rilate ludas rolon.
7) Se ekzistas supertakso de la socisanĝa rolo de internacia lingvo, same ankaŭ ekzistas subtakso de ĝia socia rolo. Kompreneble ekzistas monda lingvoproblemo, pri kiu multaj sciencistoj — ĉar poliglotoj — ne nepre konscias.

8) Tre forpuŝa estas la tro entuziasma, senkritika, sekteca sinteno de multaj esperantistoj. Strangaj sintenoj kaj vestaĵoj, certa atakemo kontraŭ homoj ne tuj konvinkitaj pri la perspektivo de Esperanto ne estas maloftaĵo.

9) Kaj fine unu grava kaŭzo por disvastigita skeptikeco: la simpla nescio pri faktoj. Pri tiu situacio ankaŭ kulpas esperantistoj informante tiel sektece kaj neefike. Sed ankaŭ estas fakto, ke ofte por laiko estas malfacile akiri fidindajn informojn. Nur dum la lastaj jaroj aperis kelkaj bonkvalitaj nacilingvaj libroj pri planlingvoj ĝenerale kaj pri Esperanto aparte. Krome, ĉirkaŭ 60 % de la literaturo pri internacia lingva komunikado estas verkita ne en naciaj lingvoj sed planlingve, plejgrandparte en Esperanto. Do ekzistas — por la neinterlingvisto — iuspeca lingva bariero.

Ĉio-ĉi, kaj la listo de la kaŭzoj estas nekompleta — ja nutras la skeptikecon, la antaŭjuĝojn kontraŭ Esperanto.

Fariĝas klare, ke efikas tre diversaj kaŭzoj, kaj ne sufiĉas ataki nur **unu** ebenon: nome ŝanĝi la nomon de la lingvo. Per tio oni tute ne forigos, ekzemple, postefikojn de la organisma koncepto, la malĝustan identigon de lingvo kun difinita ideologio, la dubon pri kapablo de laikoj, la efikojn de diletanta propagando inter la planlingvuloj, la fundamentajn super- aŭ subtaksojn de la socia rolo de lingvoj kaj la nescion pri faktoj pri la esenco kaj funkcikapablo de planlingvo. Kaj — aldone — la terminologia kaoso eĉ kreskas.

5.1.3. Cetere, al neniu venus la ideo ŝanĝi la nomon de iu etna lingvo ekz. de la germana lingvo nur pro tio, ĉar oni havas kaŭzon honti pro la parolantoj; ekzemple post la dua mondmilito bedaŭrinde pro tre kompreneblaj kaŭzoj germanoj ne estis tro alte taksataj ...

Do, FRANK ne pravas, ke la kontraŭstaro kontraŭ Esperanto „ne estas racie pravigebla". Nur necesas pli profunde analizi la kaŭzojn.

5.2. Ne estas tre klare, kial FRANK (2.2.) kontraŭstarigas „la pli malfrue enkondukitan nomon (= Esperanto) al la „pli malnova nomo" (= Internacia Lingvo). Tio estas neniel grava. Jam ekde 1889 la lingvo ĝenerale estis nomata „Lingvo Esperanto" aŭ „Esperanto" (MAIMON 1978, 130). Do la tempa distanco ne povos esti serioza argumento.

Ĉi-rilate estas rekta falsigo, se oni asertas, ke Esperanto estas „kromnomo", kiel en la AIS-materialo (FRANK-BÖHRINGER 1985, 59). Inverse. Se temas pri kromnomo por Esperanto, tiam ĝi estas „Internacia Lingvo".

5.3. FRANK (2.2., 3.6.) argumentas, ke jam diversaj institucioj uzas la nomon „Internacia Lingvo" kaj la mallongigon „ILo". Li mencias kibernetikajn instituciojn kaj la Eŭropan Klubon. En ĉi-tiuj instancoj li aŭ havas gvidajn poziciojn aŭ li fondis la menciitajn organizaĵojn, ekz. la „Eŭropan Klubon", la Akademion Internacian de Sciencoj (AIS) en San Marino kaj la Tutmondan Asocion pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko (TAKIS). Krome estu permesata la atentigo, ke la disciplino „kibernetika pedagogio" fondita de prof. FRANK nur en tre malmultaj landoj havas reprezentantojn, ne parolante pri katedroj aŭ institutoj. Tio nur estu konstato kaj neniel intencas juĝi la ekzistorajton aŭ neceson de tia disciplino.

5.4. Ni revenas al la aserto de FRANK (3.2.), ke nomoj estas arbitre fiksitaj, do ne akto de ekkonado sed de volo. Nu — bone. Sed tio neniel signifas, ke oni povas laŭplaĉe ŝanĝi nomojn. Tradicio, jarcenta fiksiĝo en dokumentoj, enpenetro en la kulturhistorian aŭ sciencan sciaron fiksas nomojn de difinitaj objektoj aŭ konceptoj tre firme, kaj tio ankaŭ rilatas al Esperanto. Jen pruvoj:

5.4.1. En ĉiuj gravaj lingvistikaj manlibroj kun ĉapitroj pri „helplingvoj" aŭ planlingvoj, ĉu pozitive aŭ negative interpretantaj la fenomenon, oni trovos la nomon Esperanto.

5.4.2. La sciencaj faklibroj (interlingvistiko / esperantologio) kompreneble nur registras la nomon Esperanto.

5.4.3. En bibliotekaj katalogoj aŭ bibliografioj la esploristo trovos la koncernan materialon ne sub „Internacia Lingvo" (eble sub „internaciaj lingvoj") sed sub Esperanto.

5.4.4. Tre grava fakto estas, ke la Internacia Standardiga Organizaĵo (International Standardisation Organisation) registras en Recommendation ISO/R639(1967) „Symbols for language, countries and authorities" Esperanto (mallongigo Eo). En la nun prilaborata versio DP 639 Esperanto reaperas (sed kun mallongigo eo).

5.4.5. Fine, ke Esperanto tute ne nur renkontas kontraŭstaron sed flanke de multaj ŝtatoj estas normale akceptata, plej klare lastatempe pruvas la rezolucio de UNESKO 1985. Tie oni ne rezoluciis por ILo aŭ la „Internacia Lingvo".

5.5. Mi ne kredas, ke la varbpsikologiaj konsideroj de FRANK (3.3.) estas ĝustaj. La etimologia signifo de la nomo „Esperanto" (de esperi) tute ne ludas rolon ĉe la nefakula publiko. Nomo estas konvencio, kaj ĝi funkcias eĉ se la origina signifo ne plu respondas al la moderna ekkono. La suno daŭras „subiri" kaj „leviĝi" kvankam la astronomio pruvis antaŭ longa tempo la ĉi-rilatan absurdecon.

5.6. Tute malprava estas la aserto de FRANK (3.4.), ke la nomo Esperanto asocias nepre al la „interna ideo". Mi jam montris la absurdecon de ĉi-tiu aserto per la aliaj supraj argumentoj sed volas aldoni, ke mi mem sufiĉe kritike skribis pri la „interna ideo" (BLANKE 1978) do ne estas adepto de ĝi. Ankaŭ multaj aliaj sciencistoj interesiĝantoj en GDR pri Esperanto, kiuj eĉ ne scias pri la ekzisto de la „interna ideo" ne vidas kaŭzon eviti la nomon. Aserti, ke la movadon kvazaŭ kuntenas la „interna ideo" estas pruvo por tio, ke oni ne konas la tre multflankan tute ne unuecon motivaron, kiu ligas la homojn al Esperanto. Pri tio verkis tre bonan analizon CORSETTI / LA TORRE (1982).

5.7. Unuavide prava ŝajnas la aserto de FRANK (3.5.), ke ne tiom gravas la akcepteblo de la lingvo-nomo por ĝisnunaj uzantoj ol multe pli la akcepteblo por la potencialaj uzontoj.

5.7.1. Tamen, oni devas tute klare diri: **sen** la tradicia Esperanto-komunumo FRANK aŭ aliaj sciencistoj utiligantaj Esperanton povus nenion fari. La interlingvistoj esperantologoj, la sciencaplikistoj (ankaŭ tiuj en AIS) venas ĝuste el tiu tute ne kohera „Esperanto-movado". Estus granda eraro kredi, ke en la nuntempaj kondiĉoj vere scienca agado pere aŭ por Esperanto estas farebla ignorante ĝuste tiun bazon, sen kiu Esperanto ne ekzistus. La institucioj de tiu tute ne nepre internacia movado ofte portas la nomon Esperanto, ekz. la Akademio de Esperanto, Universala Esperanto-Asocio kaj la scienca disciplino pri la lingvistiko de Esperanto ne nomiĝas „internacia lingvologio" sed ja „esperantologio".

5.7.2. Klara pruvo estas la sinteno de UNESKO. Malgraŭ la sendube fortaj kontraŭstaroj kaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto la premo de la faktoj (ekz. la tutmonde akriĝanta lingvoproblemo) devigas al pli serioza rilatado al la ofte primokita Esperanto-movado. Cetere, UNESKO estas UN-specialorganizo ankaŭ por **scienco.** UEA fariĝis por UNESKO iuspeca faka organizaĵo aŭ almenaŭ aŭskultata partnero pri la lingva aspekto de la monda komunika problemo. Manipulado pri la nomo ne necesis. Kial FRANK tion bezonas?

5.7.3. Parolante pri antaŭjuĝoj kaj kontraŭstaroj oni ofte nur pensas pri la **eŭropaj** sciencistoj, de kiuj multaj estas edukitaj en jam 100jara antaŭjuĝa spirito. Sed la diversaj kaŭzoj (vidu 5.1.2.) tute ne same efikas inter sciencistoj en la neeŭropaj landoj kun neeŭropaj tradicioj. Estas danĝere prijuĝi internacian (= tutmondan) fenomenon nur laŭ la vidpunkto de Eŭropo. Kiel mi menciis sub 5.1.1. FRANK eĉ ne konsideras la tutan Eŭropon sed aparte limigas sin je okcident-eŭropaj spertoj. Tio signifas, ke li klopodas altrudi sian vidpunkton kaj

la el tio rezultantan praktikon al la tuta mondo. La scienco ĉiam tendencas tutmondiĝi. Same Esperanto ne estas lingvo de la „okcidenta", „orienta" aŭ „tria" mondoj.

5.8. Necesas komenti pri la efikoj. FRANK (4.3.) mem tre bele montras, la danĝerecon de sia kamuflado. Mi tute bone komprenas la menciitajn sintenojn de FEoll kaj la reagon de la instancoj en Marilia. Mi same agus, se montriĝus, ke oni volas trompi min. Mirigas estas la tuta kamuflado des pli, ĉar ĉiam sufiĉe rapide evidentiĝas, ke la Internacia Lingvo (ILo) ja estas tiu ofte primokita aŭ ne akceptita Esperanto. Pli bone ludi kun klaraj faktoj ol per masko. Kaj tio devus esti morala principo de ĉiu sciencisto. Per tio mi ne neas, ke ankaŭ certa sciencpolitika taktiko estas necesa. Krom tio FRANK ĉiam devas konsideri la danĝeron, ke ne liaj kunlaborantoj sed eble malpli konformigitaj al li esperantistoj — eĉ sen malbona intenco — „malkaŝos" la „sekreton" pri la vera nomo de la lingvo.

Ĉu eblas vere serioze labori sub tiaj kondiĉoj?

Pri la necerteco ĉe SCHULZ kaj la karakteriza epizodo lige al la koncerto de la bulgara kantisto DAMJANOV ne necesas komento.

6. Pluaj argumentoj

Ni aldonu ankoraŭ kelkajn pluajn argumentojn:

6.1. Por eviti miskomprenon, necesas substreki, ke la por Esperanto ofte uzata sinonimo „la Internacia Lingvo" en movadaj medioj estas tute akceptebla. Pri tio oni ankaŭ atentigas en la „Bazaj principoj de informado pri Esperanto" el la jaro 1956, konata kiel „Principaro de Frostavallen". Tie oni i. a. legas sub la rubriko „Ĉefaj eraroj": „Nomi la lingvon artefarita, helpa, verda k. s.; oni ĉiam nomu ĝin aŭ La Internacia Lingvo aŭ Esperanto". Tie oni ne ekskludas la nomon Esperanto. Kaj fakte LAPENNA, la aŭtoro de la Principaro, ĉiam uzis ambaŭ nomojn alterne, neniam ekskludis la nomon Esperanto. Tamen en la Principaro temas pri alternativo (aŭ ... aŭ). En ekstermovadaj medioj, laŭ mia opinio ne estas konsilinde meti la alternativon. Pli bone paroli en nacilingva medio pri „la internacia lingvo Esperanto", ĉar tiam oni mencias la komunikadan funkcion de Esperanto, t. e. funkcii inter la nacioj. Se oni aldonas la terminon „planlingvo", oni mencias la genezon, la ekeston de la lingvo, nome, ke la bazo estis planita kontraste al etnaj lingvoj, kiuj ne estis konscie planitaj.

Do oni havus jenajn eblecojn elekti: a) la internacia planlingvo Esperanto, b) la planlingvo Esperanto, c) la internacia lingvo Esperanto, d) Esperanto. La elekton determinas la konkreta situacio kaj la aŭskultantaro. a) + b) pli konvenas por scienca medio kaj c) + d) estas eble preferindaj por ĝenerale informaj celoj. Sed nur paroli pri „La Internacia Lingvo" en etnolingva medio, estas pro teknikaj kaŭzoj ne konsilinde, ĉar ĝi esprimas certan arogon pri rajto je sola reprezentado. Scienctaktike estas tre malkonvene, aserti, ke ne estas imageblaj aliaj „internaciaj lingvoj" (kiuj ja fakte ekzistas: la tiel nomitaj mondlingvoj). Krom tio oni ne rajtas neglekti la multajn planlingvajn provojn krei internacian lingvon. Esperanto estas internacia lingvo, unu el diversaj sistemoj, sed la sola, kiu plene lingviĝis.

6.2. SAKAGUCHI (1980) atentigis pri kelkaj gramatikaj problemoj rilate al la uzo de la nomo „(La) Internacia Lingvo":

a) Pluralo povas krei la de FRANK nedeziritan miskomprenon, ke ekzistas „internaciaj lingvoj".

b) Intermeto de atributo inter la sintagmajn elementojn tute eblas, sed detruas la karakteron de propra nomo: la Internacia planita lingvo.

c) Sur la fonetika ebeno la majuskligo kiel grafika distingilo de propra nomo malaperas.

d) Se oni tradukas la nomon nacilingve akvumiĝas la karaktero de propra nomo.
Se en la angla, franca aŭ germana la artikolo ankoraŭ povas substreki

la karakteron de propra nomo, tiu ebleco jam forfalas ĉe la senartikolaj lingvoj, kiel ekz. la slavaj. Verŝajne konscia pri tiu ĉi problemo sur la paperfolioj de AIS oni ne plu tradukas: „Schreiben Sie uns bitte deutsch, englisch, französisch, italienisch oder in Internacia Lingvo (ILo)".

6.3. Mi volas substreki, ke la nomŝanĝaj klopodoj de prof. FRANK rekte konfliktas kun la diversebenaj, -temaj, -regionaj kaj -instancaj (por ne diri „tutmonda") celebrado de la jubileo de Esperanto. Kaj oni ne jubileos ILon.

6.4. Kaj laste rimarkon pri la mallongigo ILo. Tiu mallongigo havas kelkajn signifojn (kp. BLANKE 1981), i. a.:

1) Unu el la unuaj nomoj de Ido.
2) Pseŭdonimo de A. Lejzarowicz (kp. Enciklopedio de Esperanto, p. 239).
3) La mallongigo de Internacia Labor-Organizaĵo. (International Labour Organisation), ILO.
4) Sufiksoido en Esperanto.

7. Finvorto

Evidente la aserto de prof. FRANK (citita sub 5.), ke la argmentoj kontraŭ lia propono elĉerpiĝis, ne estas pravigebla. La historio de interlingvistiko kaj de la Esperanto-movado donas sufiĉe da kaŭzoj por postuli seriozan trakton ne nur de la planlingva fenomeno ĝenerale kaj Esperanto aparte, sed ankaŭ de la terminologia flanko de tiuj problemoj. Ekzistas tro da kazoj de sektecaĵoj, ŝarlatanismo kaj naivaĵoj. Se al tio proksimiĝus la valora agado de profesoro FRANK, tio estus granda evitinda perdo.

8. Literaturo

— Bazaj principoj de informado pri Esperanto. En: Esperanto, **49,** Nr. 613 (12), p. 178 — 179
— BLANKE, D. (1978): Pri la „interna ideo" de Esperanto. En: Blanke, D. (1978): Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado, Budapest (HEA), p. 182 — 208
— BLANKE, D. (1979): Instrulibro pri la arto kompromiti Esperanton. Rec. pri R. Schulz: Mein geliebtes Esperanto. Gerlingen-Stuttgart 1978. En: GDR-eldono de „Paco", Berlin 1979, p. 36 — 37
— BLANKE, D. (1980/81): Informado kaj argumentado. En: der esperantist 102 (4/1980) — 110 (5/1981). Pri antaŭjuĝoj vidu n-ro 103 (5/1980), p. 104 — 106
— BLANKE, D. (1981): Kio estas ILo? En: eŭropa dokumentaro, Paderborn, n-ro 29 (januaro — marto), p. 9 — 10
— BLANKE, D. (1985a): Internationale Plansprachen. Eine Einführung. Berlin: Akademie-Verlag
— BLANKE, D. (1985b): La spertoj kaj signifoj de Ahrenshoop. En: Esperanto, Rotterdam, **78,** n-ro 7—8 (955—956), p. 123—125
— CORSETTI, R./LA TORRE, M. (1982): Celoj kaj politiko en la Esperanto-movado. En: Hungara Vivo, Budapest, n-ro 5, p. 174—179
— FRANK, H. (1980): E-o oder ILo? Zum strittigen Bezeichnungsproblem der Internacia Lingvo (Esperanto). (Man. por diskuto kadre de la 5a Laborkonferenco „Interlingvistiko en Scienco kaj Klerigo. 4. — 10. 11. 1980, Paderborn)
— FRANK-BÖHRINGER, B. (1985): Ekesto kaj celoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AS) San Marino. Dortmund: Verlag modernes Lernen.
— GOLDEN, B. (1985): Kion bezonas la sciencistoj — la lingvon Esperanto aŭ la kodon Internacia Lingvo? En: Paco, Sofia, n-ro 4, p. 13
— GOLDEN, B. (1986): Kio estas la ĝusta nomo de la planlingvo de d-ro Zamenhof? En: La Brita Esperantisto **82,** N-ro 871 (julio-aŭgusto), p. 159—160
— GOLDEN, B. / FRANK, H. (1986): Ĉu Esperanto estas nur . . . ILo? En: Literatura Foiro, **17,** N-ro 96 (aprilo), p. 11—14 (disputo)
— SAKAGUCHI, A. (1980): Terminologia kaj nocia kaoso. En: eŭropa dokumentaro. Paderborn, n-ro 24/27 (Aprilo-Septembro), p. 6—7
— SAKAGUCHI, A. (1980): Kial la termino „Esperanto" disonancas kun la nocio „La Internacia Lingvo" (ILo)? (Man. por diskuto kadre de la 5a Laborkonferenco „Interlingvistiko en Scienco kaj Klerigo" 4. — 10. 11. 1980, Paderborn)
— SCHULZ, R. (1978): Mein geliebtes Esperanto. Gerlingen-Stuttgart: Bleicher-Verlag
— SCHULZ, R. (1979): Europäische Hochsprache oder Sprachimperialismus, Gerlingen-Stuttgart: Bleicher-Verlag
— ŠULCO, R. (1985a): Pledo por unueca lingvo. Paderborn: Esperanto-Centro
— SCHULZ, R. (1985b): Noto pri la scienceco de la Internacia Lingvo. En: Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft/Humankybernetik, **26.** N-ro 1, p. 31 — 37
— SCHULZ, R. (1985c): Ein optimales Sprachmodell. Die „Internacia Lingvo". En: W. Kürschner/R. Vogt (1985, Ed.): Sprachtheorie, Pragmatik, Interdisziplinäres. Akten des 19. Linguistischen Kolloquiums, Vechta 1984, Band 2, Tübingen, p. 58—64

Krome ankaŭ komparu la diskuton de Roy McCoy (februaro), Swerdlin (julio-aŭgusto) kaj Harlow (septembro-oktobro) de ELNA-Newsletter 1985.

Laste aperis

(Nur bibliografio. Ne libroofertoj!)

— Akada (asirobabilona) leksikono, André Cherpillod. Nanterre: la aŭtoro, 1986. 63 p. 21 cm. ISBN 2 90613400 7. Akada-Esperanta vortaro, kun parencaj vortoj el la hebrea, siriaka, araba, malta, aramea kaj amhara, kun notoj. La akada aperas latinlitere, la aliaj lingvoj en siaj skribsistemoj; kun klarigoj pri la araba, hebrea-aramea kaj siriaka alfabetoj.

— Dek prelegoj, Kálmán Kalocsay (1891 — 1976). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 126 p. 20 cm. ISBN 963 571 146 8. Dek savitaj prelegoj de la korifeo de la Esperanta literaturo: „La Esperanta poezio", „La perspektivoj de la Esperanta literaturo", „La arto de la verstraduko", „Esperanto kaj literaturo", „Erošenko, la blinda mondmigrulo", „La tragedio de l' homo kaj Imre Madách", „La hungara kultura revolucio", „Pri la vortosistemo de Esperanto" k. a.; kun antaŭparolo de Ada Csiszár kaj notoj pri ĉiu prelego.

— Esperantaj sinonimoj, B. Berin kaj J. Ojalo (1914). Vilnius/Tallinn/Kaunas: eld. ne menciita, 1985, 30 p. Mimeo. 20 cm. Listo de 1924 numeritaj ĉerfvortoj kun sinonimoj, plus indekso.

— Groteskaj dialogoj, Zora Heide (1924). Stokholmo: Författares Bokmaskin, 1985. 72 p. Ilus. de D. Toplak. 21 cm. ISBN 91 7238 534 5. Dek kvar skeĉoj.

— Ili kaptis Elzan!, Johán Valano (pseŭd.). Chapecó (Brazilo): Fonto, 1985. 100 p. 21 cm. Fonto-Serio n-ro 9. Humura romano, kun ama kaj aventura aspektoj, en facila Esperanto (ĉ. 836 morfemoj) precipe por homoj kun elementa scio de la lingvo.

— Likenoj de okcidenta Eŭropo; Ilustrita determinlibro, G. Clauzade kaj C. Roux. Royan (Francio): Société Botanique du Centre-Ouest, 1985. 893 p. Ilus. de P. Raimbault, C. Gabouriault, R. Rieux, C. Roux. 25 cm. Bind. Speciala n-ro 7-1985 de Bulletin de San-Marino. Impona scienca verko por determinado de specioj de likenoj, kun i. a. antaŭparolo en la franca kaj Esperanto, bibliografio kaj indekso de la taksonoj.

— Maja pluvo, Julian Modest (pseŭd.). Chapecó (Brazilo): Fonto, 1984. 94 p. 21 cm. Fonto-Serio n-ro 4. La unua romano de la aŭtoro, koncerne liajn konceptojn pri la homaj rilatoj en la ĉiutaga vivo.

— Pupo fariĝis signo, Sutoo Kacuzoo. El la japana trad. Jamagata Eo-klubo. Yamagata: Jamagata Esperanto-Klubo, 1984. 19 p. Kolorilus. de Mita Genjiroo. 26 cm. Rakonto, bazita sur faktoj, pri la rolo de pupo en milito kaj amo.

— Plaŭ! Plaŭ!, Jang Sjaúĉun. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 57 p. (nenumeritaj). Kolorilus. 21 cm. Besta fabelo por junaj infanoj pri neracia timo.

— Acta interlinguistica; 12a Scienca Interlingvistika Simpozio, red. Ryszard Rokicki. Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne, 1985. 187 p. 20 cm. Dek du traktaĵoj (1984) de Symoens, Verloren van Themaat, Janton, Ejsmont, Marwell, Duc Goninaz, Rokicki, Lo Jacomo, Melnikov, Frank, Pstrusinska kaj Olde-Kalter.

— Angelo, Tirano de Padovo; Aktoj unua kaj dua, (1835), Victor Hugo (1802—1885). El la franca trad. Daniel Luez (1924). Parizo: Unuiĝo Franca por Esperanto, 1986 (ne indikita). 48 p. 21 cm. Serio: Antologieto de la franca literaturo; Teatro; 19a Jarcento. Proza dramo pri oligarkio subpremanta la popolon.

— Ĉina-Esperanta vortaro. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 718 p. 19 cm. Bind. Vortaro kun pli ol 30 mil kapvortoj, aranĝitaj laŭ la ĉina latinlitera alfabeto (pinyin + tonindikiloj) kun la ideografiaĵoj, ideografiaja indekso, esperantigitaj lokonomoj ks., prononctabelo, kronologia tabelo de Ĉinio kaj tabelo de kemiaj elementoj.

— Ĉu rakonti novele?, Johán Valano (pseŭd.). Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1986. 144 p. 21 cm. Serio „Stafeto" n-ro 1. ISBN 90 71205 10 4. Dek unu krimaj enigmoj, solvotaj de Jano Karál, konata el aliaj „Ĉu"-titolaj libroj de la sama aŭtoro.

— English-Esperanto Dictionary (1921), F. Fulcher kaj B. Long. Londono: British Esperanto Association, 1985 (represo de 3a eld. de 1963). 332 p. 19 cm. Angla-Esperanta vortaro (kun notoj kaj listo de propraj nomoj), jam anstataŭita per pli modernaj kaj adekvataj.

Reaktivado de la volapukistaro

Bernard Golden

Leginte la artikolon „Kiom da Interlinguaanoj? de d-ro Detlev Blanke (der esperantist, n-ro 133 [5/1985], pĝ. 107, 106), oni povas tiri la malgajan konkludon, ke la Interlinguamovado neeviteble malaperos, kiam la adeptoj de tiu planlingvo malmultiĝos ĝis nul — kondiĉe, ke ne aperos novaj adeptoj en la estonteco. Pro tio, oni neniam povas esti

centprocente certa pri prognozoj sur la tereno de la planlingvistiko. Kiel respondi jenan demandon: kiom da volapukistoj? Jam en la 19-a jc. volapuka movado estis destinita al la abismo de forgeso, kaj ĝi jam atingis tiun tristan sorton, se oni povas kredi jenan anoncon.

„La lasta volapukisto . . la 8-an de januaro 1977 mortis Johann Schmidt, la lasta germana volapukisto (aŭ ĉu de tuta Eŭropo aŭ eĉ mondo?) en malsanulejo en Weiskirchen, Taunus, FRG." **(Paco,** GDR-eldono, 1978, pĝ. 28)

En artikolo titolita „Memorigo pri pioniraj hungaraj volapukistoj — solenado de la centjara datreveno de la naskiĝo de Volapuko **(Hungara Vivo**, 3/1980, pĝ. 89) mi skizis parton de la historio de la planlingvo de Johann Schleyer kaj priskribis la agadon de hungaraj volapukistoj, do mi ne ripetos tiujn donitajojn tie ĉi(l). Okaze de la jubileo de volapuko mi faris enketon kaj malkovris dekon da ĝisvivantaj volapukistoj dise en la mondo. Pluraj esploroj indikis, ke la volapuka movado neniam tute formortis. Dum la jardekoj post la morto de Pastro Schleyer en 1912, preskaŭ ĉiam troviĝis iu, ie, kiu redaktis gazeton, eldonis broŝuron aŭ portis titolon de prezidanto de ombreca organizaĵo. Kvazaŭ fenikso la Akademio de Volapuko plurfoje renaskiĝis. En sia artikolo „Mondlingvaj Akademioj" (en **Li kaj Ni**, Festlibro por la 80a naskiĝo de Gaston Waringhien, 1985, pĝ. 381—384) Tazio Carlevaro informas, ke la Volapuka Akademio elektita de Schleyer en 1980 restis neaktiva kaj „malaperis senspure jam en 1893. „Tamen, poste ni ekscias, ke en 1929 Albert Sleumer, d-ro Arie de Jong kaj Jakob Sprenger „gvidis la lingvan evoluon de Volapük kvazaŭ malgranda Akademio." Ankaŭ hodiaŭ volapukaj akademianoj donas vivsignojn.

Antaŭ nelonge mi ricevis ekzempleron de **Volapükastuds** (Volapukaj Studoj). Ĝi estas duonjara „informilo oficiala de la studentoj pri Volapuko", redaktita en du lingvoj, volapuke kaj Esperante! La celo de tiu kvarpaĝa, modestaspekta bulteno estas „pruvi ke la Volapukistoj agnoskas la unuarangecon de Esperanto, kaj por honorigi de la Esperantistoj Volapukon kiu de nun, apartenas al la Esperantaj kulturo kaj historio." La Prezidanto de la Volapukistaro, Brian R. Bishop el Anglio, dekretas, ke laŭ la statutoj de la Akademio de Volapuko Jean-Claude Caraco el Francio estas elektita vicprezidanto de la volapukistaro. Dua prezidanta dekreto temas pri la elekto de Filippus Johann Krüger el Nederlando kiel ĉefakademiano kaj s-ro Caraco kiel akademiano. En sia tria oficiala anonco la Prezidanto „institucias la dignecon de honora diplomo de Volapukologio, kaj . . . honoras unuafoje per ĉi-tiu honoro sinjoron Reinhard Haupenthal" el FR Germanio, kiu okupiĝas pri la historio kaj bibliografio de volapuko.

Indas mencii kelkajn lastatempe aperintajn seriozajn verkojn pri volapuko. En la ĉi-supre citita Festlibro por Gaston Waringhien estas detala biografia artikolo pri Johann Martin Schleyer, verkita de Haupenthal, kaj mia kontribuajo en la sama verko koncernas la influon de volapuko sur la ĝermanan komponanton de Esperanto. Je la peto de Haupenthal, kiu estas la eldonisto de **Volapükabled lezenodik**, la oficiala organo de la volapuka movado, mi kompilis bibliografion enhavantan 30 titolojn de miaj verkoj pri volapuko, publikigitaj inter 1979 kaj 1985. Interlingvistoj kaj esperantologoj nuntempe havas kiel konsultlibron por sia reserĉo represon de la unua gramatiko pri volapuko verkita de Schleyer en 1880, la volapukan bibliografion de J. Schmidt kaj kompilajon de dokumentoj pri la unua volapuka kongreso en 1884.

Ĉar hodiaŭ plejparte esperantistoj interesiĝas pri kaj dediĉas sin al volapukaj studoj, estas ja nature — kvankam paradokse — ke la aktuala lingvo de interkomunikado inter volapukologoj estas Esperanto. Tiu situacio kondukas al eĉ pli surpriza konkludo: se Esperanto funkcias kiel la laborlingvo de la volapukistaro, tiam volapuko neniam mortos! Pri tio certe kontentiĝos la etnistoj, kiuj en sia propagando, marteladas la punkton, ke Esperanto estas konvena rimedo por defendi la minacatajn lingvojn de malgrandaj popoloj. La volapukistoj sendube apartenas al la kategorio de lingva minoritato, do la esperantistoj, kunlabore kun la etnistoj, havas la devon defendi la rajton de volapukistoj uzi sian lingvon inter si kaj Esperanton kun nevolapukistoj.

§§§

1. Vidu ankaŭ mian artikolon „Volapuko — la internacia lingvo, kiu ne volas morti" en **„der esperantist"**, n-ro 113/114 (3/4, 1982), pĝ. 66—67.

§§§

VOLAPÜKABLED reaperis

Dum la lastaj jaroj konstateblis kreskanta interesiĝo pri la plej grava plan-lingvo de la 19a jarcento, Volapük. La volapükologio — scienco pri la lingvo, movado, literaturo kaj historio de Volapük — tamen ankoraŭ troviĝas en embria stato.

Por doni pli solidan bazon al studoj tiudirektaj SEL[1]) decidis eldoni dufoje jare apartan stud-organon pri Volapük: VOLAPÜKABLED. (Sub tiu titolo J. M. Schleyer eldonis de 1881—1908 la centran organon de la Volapük-movado.)

La unua numero jus aperis (20-paĝa, plus kovrilo). Ĝian titol-paĝon ornamas portreto de pastro J. M. Bakalar (1857—1935), aŭtoro de Volapük-lernolibroj por ĉeĥoj.
El la enhavo de numero 1:

EDITORIALO
ĈEF-ARTIKOLO: La preceptoroj Hayer kaj Heintzeler
VOLAPÜK-INFORMOJ (novaj eldonaĵoj, eventoj . . .)
RECENZO (pri la libro „La unua Vp.-kongreso)
MALLONGE

La revuo aperas tute en Esepranto kaj estas kompostita kaj ilustrita.
Ni invitas al abono.

[1]) Sarlanda Esperanto Ligo.

RECENZOJ

Riĉa bukedo kun unu dorno

Li kaj ni. Festlibro por la 80-a naskiĝtago de Gaston Waringien (1901 — 29 Julio — 1981). Editoris Reinhard Haupenthal. 1985, Antverpeno — La Laguna: Kehlet/Stafeto, 512 p. + 8 p. leterreproduktaĵoj, 150 x 215.

Kun kvarjara malfruiĝo post la vivojubileo de la Esperanta enciklopediisto Gaston Waringien, 13 jarojn post lia „Ni kaj ĝi", aperis kolekto de kontribuoj por „Li" de 27foje „ni" (la 28-a, Annakris Szimkat verŝajne estas pseŭdonimo de la editoro). La editoro sukcesis kunmeti riĉan bukedon. Li mem, M. Boulton (poeme) kaj R. Bernard prezentas la multfacetan kaj por la evolu(ig)o de Esperanto tiel kreivan vivon de la jubileulo. W. Auld analizas la „kulturarkivon" nica literatua revuo, pri kies redaktoro (G. W.) prezentas siajn rememorojn la eldoninto R. Fiquet. Gaston Waringhien, la eseiston, prezentas F. Diego, la tradukiston C. Conterno kaj K. Hall, la leksikologon J. Wells, kaj du pseŭdonimojn de G. W. (G. E. Maŭra, G. Peterido Peneter) analizas M. Duc Goninaz. D. B. Gregor kritikas la tradukon de Eneido far Vallienne. K. Matuba traktas pri originalpoemaj hajkoj kaj utaoj. H. Vatré vortstatistike prilumas aŭtorajn stilapartaĵojn, ankaŭ tiujn de G. W.. W. Wingen prezentas itismajn formojn el la Zamenhofa traduko de Fabeloj de Andersen kompare kun la germana tradukolingva bazo. A. D. Atanasov demandas pri arbitraj elementoj en Esperanto kaj M. Boulton ofertas tre intersan studon pri nomenklaturo de koloroj. Skrupulege N. Kawasaki elplukas diferenc(et)ojn inter la 5 eldonoj de „Marta" kaj N. C. Maimon surprizas per la aserto, ke la ŝatokupo (sic!) de Zamenhof estis la ... relegio. Traktas pri fonemaj opozicioj en Esperanto M. Mangold, pri signo-signifo-problemoj I. Szerdahelyi kaj pri determinado F. Pennacchietti. La skiza studo de T. Carlevaro pri mondlingvaj akademioj bedaŭrinde malhavas ĉapitron pri la Akademio de Esperanto, kies prezidanto dum longa tempo estis Waringien. Ĝuste pri la taskoj, funkciado kaj perspektivo de la lingva institucio de Esperanto urĝe necesas rezonadi. P. Forster sociologias pri la Ido-skismo kaj B. Golden trovas volapukan influon en la ĝermanaj elementoj de Esperanto. St. Ĝuĝev diskutas estetikajn problemojn en interlingvistiko, bedaŭrinde kontraŭ PIV, nome „sinĥrone" kaj „diaĥrone", tamen donante interesajn vidpunktojn pri la lingvistike apenaŭ akceptebla estetikumado pri lingvoj. (Pri-) Zamenhofajn dokumentojn prezentas J. Régulo kaj iu mistera A. Szimkat. La meritplena editoro aldonas al siaj bonegaj volapukologiaj studoj pluan, nome pri Schleyer. Interesa estas la ampleksega eseo de A. Albault (pp. 111—193) pri alfabetoj (inkluzive la Esperantan) kaj preseblecoj, kvankam ĝenas troo da apostrofoj, kontraŭfundamenta w en westo (= okcidento), la superflua eosto (= oriento), cirilla (116) anstataŭ cirila, hella (115) anstataŭ helena, Lituanio (117) anstataŭ Litovio, makuloj, kiujn oni ne atendus de la prezidanto de la Akademio. Komplete katastrofa, kvazaŭ dorno en la bukedo, estas la somnambula „evoluo de Esperanto" de K. Piĉ, kiu ĝonglas per bombastajoj senenhavaj kaj laŭ kiu la bedaŭrinda lingvo de Zamenhof disponas pri magiajoj kiel i. a. „absoluta strukturo, perfekta artefariteco, absoluta skemo, maksimuma simplo, universala kombineblo, centprocenta konstanteco, senekzempla unikeco" kaj „harmonia estetiko". Ni krome ekscias en la neologisme mania lingvaĵo de Piĉ, ke „Esperanto ne evoluas .. . eĉ ne povas evolui (290) kaj ke „Esperanto senĉese abrupte evoluas" kaj „tamen tute ne ŝanĝiĝas" (292). Komprenu, kiu povas. R. Haupenthal kaj H. Vatré unuafoje listigis (ĉiujn?) publicaĵojn de la jubileulo. Sekvas tre malsamdetalaj priaŭtoraj notoj. Mankas indeksaj pri personoj kaj temoj. Ne estas klara la ekesto de la Tabula Gratulatoria, kie enestas nekontribuintoj kaj mankas aliloke gratulintoj. Entute enhave kaj amplekse tre digna omaĝo al enhave amplekse tre digna enciklopedia kultivanto de la Zamenhofa lingvo.

(La teksto ankaŭ aperis en „Esperanto" 7-8/86)

Detlev Blanke

MEMUARO PRI FLAMOJ

far Nobuko Yamamoto, tradukita de Janet Bixby, eldonita de Stelidoj, Japanio, 1985, ĉ. dek paĝoj — aŭ pli ĝuste trioble dek, ĉar en angla, Esperanto kaj en japana lingvoj, DIN A 4.

Estas mirinde, ke tiuj nur kelkaj paĝoj povas kaŭzi tiom da emocio! Kiel „Akvon, mi petas", „Danjo en Vjetnamio" kaj kelkaj aliaj ankaŭ tiu ĉi kajero (belaspekta) montras tute individuan amaran sperton pri la senhumana — ne, kontraŭhumana — militarismo, profite al usona reganta imperiisma klaso. Intertempe estis sufiĉe pruvite, ke tute ne necesis uzi la atombombojn super Hirošima kaj Nakasagi por venki Japanion, sed ke tiuj bomboj kontraŭ plejparte civiluloj, infanoj, virinoj kaj maljunuloj impresu Stalin, ke ili servu ĉantaĝe kontraŭ Stalin ĉe la konferenco de Potsdam. Sed pri tio ne temas en la Memuaro.

Nobuko Yamamoto simple rakontas, kiel ŝi kun sia filino Eiko estis surprizitaj de tiu terura bombo, kiel ŝi travagis la detruitan, brulantan urbon por serĉi sian alian filinon Yoko — kiun ŝi finfine trovis morta — kaj sian edzon. Je la fino de ĉia rakonto Nabuko Yamamoto meditas: „Kion la Ĉiopova pensis, permesinte tiun inferon? Mi nun firme kredas, ke paradizo kaj infero ambaŭ ekzistas nur en tiu ĉi mondo. Mi vidis la inferon en ĝia plej brutala formo. Se Dante vivus en la nuna tempo kaj travagus la detruon de la Bombo, li verkus pri pli mizera infero ol tiu, kiun li priskribis en „Dia Komedio".

„Ĉu tiu ĉi sensenca buĉado tamen neniam finiĝos?"

Nepre legu tiun verketon kaj rekomendu ĝin al aliaj, por ke ĝi helpu plifirmigi la falangon da pacdefendantoj kontraŭ atombomboj kaj entute kontraŭ ĉiuj militoj!

Ludwig Schödl

Junulara Estraro en Bad Saarow

Je la lasta semajnfino en aprilo (86/IV/25-27) ni renkontiĝis pro nia III-a kunveno en Bad Saarow. Troviĝis inter alie sur la tagordo analizo de la kulturtogoj en Halle, same la preparado de nia internacia seminario „Junularoj kaj Kulturo" en Gusow. (Bedaŭrinde tiun seminarion poste ni devis nuligi pro teknikaj kaŭzoj)
Sub la direktado de nia diskutgvidanto Andreas Penk (kiu komence informis nin koncerne la UNESKO-rezolucion lige al la 100-jara naskiĝtago de Esperanto) ni interkonsiliĝis pri problemoj de nia junulara laboro. Diskutpunktoj estis nia kunlaboro en TEJO, kiun ni jesas, tamen ni ege kontraŭstaris la decidon kongresi en Israelio. Krome por niaj gejunuloj necesas krei pli bonan eblecon uzi la „Pasportan Servon" (internacia adresaro de TEJO) kaj pliforte kunlabori kun FDJ.
Okazis ankaŭ ŝanĝo de taskoj. Pri „JC" transprenis respondecon Sylvia Lassika kaj Katrin Mattusch (krome por la kroniko). Andreas Penk forlasis nian estraron en majo — la novaj vicprezidantoj estas Matthias Bunk kaj Thorsten Lemke. Andreas kunlaboros en Mentora Grupo kune kun Rainer Valtin kaj Ulrich Becker kaj staros plue ĉe nia flanko. Christian Schmitz estis liberigata de sia funkcio.
Bedaŭrinde kelkaj funkciuloj ne aperis. Estas domaĝe, ĉar niajn problemojn en la junulara Esperanto-movado ni nur povas solvi kune — aŭ tute ne. Tial ni, la ĉeestantoj, esperas por la venonta (IV-a) kunveno, ke denove ĉiuj membroj de nia estraro kunsidos, por sukcesigi nian komunan laboron.

—Leo— (T. Lemke)

Faka agado en kadro de TEJO

Komisiono pri Scienca Aplikado de Esperanto prezentas al ĉiuj studentoj kaj junaj fakuloj la eblecon kunlabori, kiuj volas uzi Esperanton por siaj fakaj rilatoj.
KSA — la konstanta komisiono de TEJO — establiĝis dum la 36-a IJK en Rauma (Finnlando, 1980) kaj novfondiĝis dum la 39-a IJK en Debrecen (Hungario, 1983).
Ĝi devas plenumi multajn diversajn taskojn por la scienca aplikado de Esperanto kaj por la ebligo de la spertinterŝanĝo inter la unuopaj fakoj kaj sciencoj pere de Esperanto. En kadro de tio KSA kunlaboras kun la sciencaj kaj fakaj organizoj de UEA kaj strebas havi kontaktojn kun la Komisiono pri faka agado de UEA. Tre grave estas ankaŭ, ke ĝi kontaktu kun neesperantistaj junularaj kaj sciencaj organizoj.
Por solvi tiujn taskojn la estraro de KSA komencis listigi junajn interesatajn fakulojn kaj studentojn por helpi kaj instigi al ili fondi fakgrupojn.
Ekzemple ekzistas jam la fakgrupo por naturprotektado (KoKo) kiu okazigas la 2-an internacian naturprotektadan tendaron inter la 11-a ĝis 18-a de aŭgusto 1986 en Hungario.
Pli detalaj informoj ĉe: Detlef Kraus, Str. d. Friedens 18, Hoyerswerda, 7700.

Laŭ informoj de J. Barossné

TEJO-PSEK-seminario por Esperanto-aktivuloj

Inter la 20-a ĝis 27-a de marto okazis en Radzików/Pollando la 4-a TEJO-PSEK seminario sub la ĉeftemo „KER-kiucele?"
(KER: Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO)
Partoprenis 62 gejunuloj el 8 landoj, inter ili ĉiuj TEJO-estraranoj escepte Alex Humet. El GDR venis 5 Esperanto-aktivuloj, 3 de ili estas membroj de la junulara estraro. En prelegoj kaj laborgrupoj ni traktis la temojn: Kia estas la nuna stato de KER? Kiamaniere plue labori? Kiuj kontaktoj de TEJO kun internaciaj junularaj organizoj estas vere gravaj? kaj: Kiamaniere efektive uzi tiujn kontaktojn? Honora gasto dum la seminario estis Barbara Despiney el Francujo. Ŝi prelegis pri „Eksteraj rilatoj de UEA kun speciala konsidero pri rilatoj kun UNESKO".

Jen foto pri la junulara grupo „Olof Palme" en Warin. Instruas Esperanton la veterano de la laborista Esperanto-movado Ernst Diedrich. (Vidu la korespond-dezirojn!)

Aliaj gravaj diskutpunktoj estis la agado de TEJO dum la jubilea jaro kaj la osa laboro de KAT (Komisiono por Aktivula Trajnado). Estas bedaŭrinde, ke nur ĉirkaŭ 20 seminarianoj partoprenis la programon. La aliaj, prefere polaj gejunuloj, uzis la seminareblecojn nur por ripozi kaj babili. Estus necese, ke la organizantoj pli zorgeme elektu la partoprenantojn. Flanke de la programo okazis multaj malgrandaj oficialaj kaj privataj kunsidoj. Por ni grava afero estis nia kunsido kun la estraranoj de TEJO. Komune ni diskutis la eblecojn por la Esperanto-junularo de GDR, pli forte kunlabori en TEJO. Detale ni ankaŭ disputis pri tiu — laŭ mia opinio tute fuŝa kaj danĝera — decido, kongresi en Israelio. Ian Jackson klarigis al ni la paŝojn, kiuj gvidis al tiu decido, kaj ankaŭ li opiniis, ke multaj komitatanoj verŝajne ne sufiĉe pripensis siajn voĉdonojn.

Kelkaj kulturaj vesperarangoj rondigis la programon, ekz. la kantado de Roman Bura, kiu tre plaĉis al ni.

Entute la seminario estis informriĉa kaj interesa.

Certe la TEJO-seminarioj estas gravaj paŝoj por plibonigi la interkompreniĝon kaj kunlaboron inter la unuopaj junularaj Esperanto-organizoj kaj ene de TEJO!

La venonta TEJO-seminario okazos printempe 1987 en Bulgario organizota fare de BEJ.

D. Kraus

IVa interlingvistika (esperantologia) konferenco en Uralo

Komence de aprilo en la Perma ŝtata universitato okazis la tradicia 4a scienca konferenco pri planlingvoj, kies ĉefa temo estis esperantologio. Dum la unua labortago estis prezentitaj 7 raportoj:

— B. Kolker (Ufa): Evoluo de Esperanto.
— S. Straŝnenko (Tjumeno): Fonematika aparteno de la sonoj ŭ kaj ĥ.
— A. Korjenkov (Sverdlovsk): Tipaj morfologiaj specifaĵoj ĉe la ruslingvaj esperantistoj.
— V. Kudrjavcev (Sverdlovsk): Kompara analizo de uzado de la artikolo „la" en la tekstoj de la rus- kaj alilingvaj esperantistoj.
— H. Gorecka (Svedlovsk): Uralaj toponimoj en Esperanto.
— G. Gazizov (Ufa): Kunmetitaj vortoj en Esperanto.
— L. Kuzjmenko (Nijnij Tagil): Pri la demando pri la stilaj specoj en Esperanto.

La raportoj vekis grandan interesiĝon kaj viglan pridiskutadon de ties enhavoj. Resumante la rezultojn de la unua labortago la gvidanto de la konferenco, lektoro de la filologia fakultato de la universitato N. F. Ponomarjov, akcentis plialtiĝon de la scienca nivelo de la raportoj kompare al la konferenco okazinta 1985.

La duan tagon okazis seminario pri celoj, politikoj, valoroj kaj evolutendencoj de la Esperanta komunumo. Oni prezentis 4 raportojn, kiuj tiel aŭ aliel traktis la Manifeston de Raŭma — la kulturaj kaj kulturpolitikaj aspektoj de la Esperanta komunumo interesas ankaŭ uralajn esperantistojn. Estas sendube, ke dum la lastaj jaroj liveriĝis nova tendenco ebliganta pli objektive taksi la eksterlingvajn fenomenojn de Esperanto.

Krom la ĉeftemaj aranĝoj estis organizita ankaŭ literatura vespero omaĝe al la urala poeto-futuristo Vasilij Kamenskij, vizito al la urba arta galerio kaj tradicia sesio de la traduka rondo. La sekva, jam la kvina, Urala konferenco pri planlingvistiko okazos denove an Permo, aprile 1987.

Viktor Kudrjavcev, SU — 620145
Sverdlovsk, 145 pk 287.

ISEU IV

En Veliko Tarnovo (Bulgario) okazis la IVa ISEU (20. — 25. 7. 1986). Partoprenis ĉ. 120 esperantistoj el Bulgario, Hungario, GDR, Pollando, Finnlando, Ĉeĥoslovakio, Sovetunio, Japanio. Eksterlandaj prelegintoj: d-ro A. Mathe kaj doc. V. Balog (Hungario), S. Kauppinen (Finnlando) kaj bulgaraj: doc. K. Velkov, G. Mihalkov, L. Mihajlov, N. Janev, D. Hitrov kaj O. Cankova prelegis pri E-terminologio, Interlingvistiko, E-poezio, E-instruado, E-gramatiko k. s. Eldiron (kuna kunlaboro de Simon, Ullrich kaj Marinov) faris d-ro Simon el GDR pri forst-terminologio.

La ĉeestintoj memorigis la memoron de bulgara lingvisto, akad. V. Georgiev, mortinta la 14an de julio 1986.

La soveta esperantisto-aktoro Oleg Popkov el Leningrad prezentis unuhoran monologon „Sonĝo de ridinda homo" de Dostojevski. Agrabla surprizo por la ĉi-jara ISEU estis la pentristino Helga Plötner el GDR, kiu dum okazinta ISEU sukcesis pentri 13 portretojn de diversnaciaj partoprenintoj. La lastan tagon oni ekspoziciis ties kolekton. La loka veterano Hr. Dolĉinkov faris ekspozicion de sia riĉa kolekto (ĉ. 200) de E-lerniloj.

Dum la adiaŭa vespero oni admiris la specialan spektaklon „Sono kaj lumo" el la mezepoka fortikajo „Carevec".

La IV-a ISEU signas novan ŝtupon en sia evoluo. La organizantoj priatentis la ĉefan mankon de tri antaŭaj ISEU- la akuratecon. Ĝojigas tiaj eldiroj: „Ni ne sentis, ke oni organizas . . . ĉio iris glate".

O. Cankova

Lingvistika seminario de SEA

Jam la 6-an fojon okazis de la 13—15. de junio 1986 en la bela ĉirkaŭaĵo de Nitra (en Beladice) lingvistika seminario de SEA. Kiel akcentis en sia malferma parolado prezidanto de SEA d-ro Andrej Lukáč, CSc., en tiu ĉi aranĝo, kiu havas en la spektro de asocia agado gravan rolon, koncentriĝas la faka potencialo de interlingvistika kaj esperantologia kampo kadre de la tuta Ĉeĥoslovakia Socialisma Respubliko kaj = kio estas aparte ĝojiga — ĝi fariĝas firma konsistaĵo de tiudirekta agado en la landoj de socialisma mondo.

Prelegis entute 8 lektoroj pri jenaj temoj:

1. d-ino Věra Barandovská
   Ĉu Esperanto latinecas?
2. Vladimír Gregor
   Pri la logiko en la lingvo ĝenerale kaj en Esperanto speciale
3. d-ro Erich Spitz, CSc.
   La artikolo en Esperanto kaj en etnaj lingvoj
4. Inĝ. Aleš Bednařík
   Ĉu „h" denove moderna?
5. Inĝ. Jan Werner
   Signifo kaj senco de vorto en terminologio
6. d-ro Jiří Zeman
   Kunigo de fonemoj en Esperanto
7. d-ro Balázs Wacha
   Esperanto kaj ĝia uzado en familio
8. d-ro Stanislav Košecký
   Pri la facileco de Esperanto el lingvistika vidpunkto

Post ĉiu prelego sekvis diskuto la al temo. Libera diskuto al prelegitaj temoj, resp. al interlingvistika agado en SSR estis organizita post oficiala programo dimanĉe antaŭtagmeze.

Al la sukceso de la seminario grave kontribuis per sia oferema organiza laboro anoj de Esperanto-rondeto en Nitra sub gvido de s-ro Meňhart, kiuj preparis por ĉiuj partoprenintoj bonegajn materialajn kondiĉojn. La seminario pruvis daŭre kreskantan kvaliton ne nur de unuopaj temoj, sed ankaŭ de konsisto de lektora korpo.

S. Košecký

Oferto: Jubilea E-kalendaro

Ni ofertas Jubilean E-kalendaron por 1987. Prezo je peco M 2,50; 10 pecoj M 23,—; 100 pecoj M 210,—. De ĉiu kalendaro M —,50 iras por solidarkonto. La kalendaro estas 40 x 30 cm, teksajo, kun verda surskribo: 100 jaroj de Esperanto 1887 — 1987, por paco kaj interkompreniĝo.

Mendojn bv. direkti al: Esperanto-Verband im Kulturbund der DDR, Altmarkt 4, Auerbach, 9700.

Enpagoj al konto n-ro 5832-37-919, Kreissparkasse Auerbach, Esperanto-Verband, „por kalendaro".

S. Rynduch

Turismaj tagoj en Žilina

Cent esperantistoj turistoj el Bulgario, Finnlando, GDR, Hungario, Italio, Pollando kaj Ĉeĥoslovakio partoprenis la 8-ajn Turismajn Tagojn (26. 7. — 1. 8. 86) en Žilina ČSSR. La partoprenantoj vizitis famajn turismajn centrojn de Slovakio Vrátna-valon, Rokaron de Súlov kaj ankaŭ naturmuzeon en la urbo Rožnov/Moravio. Okazis ankaŭ akcepto ĉe la prezidanto de Urba Nacia Komitato. Pri la aranĝajo informis 5 slovakaj gazetoj kaj Slovaka Radio. Turismaj Tagoj allogas ĉiam pli multajn turistojn.

Sub la flago de l'amikeco

Granda evento en la vivo de la sovetiaj esperantistoj estis la 23-a Baltia Esperantista Tendaro (BET-23), okazinta la 10-20-an de julio 1986 en la urbeto Smalininkai, distr. Jurbarkas (Litovio), dediĉita al la Internacia Jaro de la Paco.

Ĝiaj mastroj estis litovaj geesperantistoj, sed partoprenis ĝin gesamideanoj ankaŭ el 12 uniaj kaj 6 aŭtonomaj respublikoj de Sovetunio, entute 472 personoj. La tendaro estis perfekte organizita. La partoprenintoj loĝis, manĝis kaj laboris en oportunaj ejoj, ĉio en la sama korto.

La ampleksa tendara programo enhavis: 1. dugradajn Esperanto-kursojn, 2. Someran Universitaton, laborintan laŭ tri sekcioj: lingva, medicina kaj sciencteknika, 3. seminariojn por klubestroj, kursgvidantoj, tradukistoj, 4. ekskursojn tra la distrikto Jurbarkas, dum kiuj oni konatiĝis kun pitoreskaj ĉirkaŭaĵoj kaj historiaj lokoj, 5. la tagon de sociutila laboro, kiam tendaranoj diligentis en la loka štata bienego, 6. la mitingon por la Paco, 7. vesperajn amatorajn koncertojn.

En unu granda ĉambro estis instalita riĉa diverstema ekspozicio. Funkciis alloga butiko, en kiu oni povis akiri interalie la novaperintan en Esperanto litovan poezian libron „Homo" de E. Mieželaitis (mejelajtis).

Ni aldonu, ke ĉiuvespere post la lastaj enprogramitaj eroj nelacigebla junularo ankoraŭ longe bruligis tendaran lignofajron, kantis kaj dancis.

La dek tendaraj tagoj forflugis kiel sonĝo. Disigonte ni ne diris „adiaŭon", sed: „ĝis la revido en la sekvonta BET-24".

B. Trimakiene

Teo Jung (1892 — 1986)

La 13-an de majo forpasis Teo Jung, germano, la plej rekonata esperantista ĵurnalisto de la mondo. Inter 1917 — 1919 li eldonis monatan revuon Progreso. En 1920 li fondis la semajnan ĵurnalon Esperanto Triumfonta, kiu en 1925 šanĝis sian titolon je Heroldo de Esperanto. Teo Jung dum jardekoj redaktis tiun ĉi rekonatan internacian movadan revuon. Li skribis multnombrajn artikolojn, poemojn, skizojn, rakontojn en multaj E-revuoj, krome aperis kelkaj liaj libroj.

Eduardas Mieželaitis: HOMO. Poemciklo, esperantigita el la litova far Petras Ĉeliauskas. Eldonejo „Vaga", Vilnius 1986, 94 paĝoj, kun lignogravurajoj. Prezo: 60 kopekoj.

Eduardas Mieželaitis (pr. Eduárdas Mejelájtis) estas popola poeto de Litova Soveta Socialisma Respubliko, Heroo de Socialisma Laboro, laŭreato de Lenin-premio kaj de multaj aliaj altaj distingoj. Li naskiĝis en 1919 en laborista familio kaj ekde 1935 ĝis hodiaŭ aperas poemkolektoj al lia plumo, kaj por infanoj, kaj por plenkreskuloj.
La libron „HOMO" la aŭtoro mem taksas kiel programan verkon sur sia vojo de krea serĉado. Ĝi naskiĝis „atenteme sekvante per la okuloj kaj kontrolante per la koro la šanĝiĝantajn tempon, vivon kaj homon". Por tiu verskolekto la poeto estis premiita en 1962 per Lenin-premio.
La plej elstara trajto de la verko estas la humanista patoso de la poemoj. Jen eble problemo por kelkaj legantoj, ĉar la liriko de la okdekaj jaroj tute ne plu šatas patoson. Sed la recenzanto konfesas, ke la denova renkonto kun tia preskaŭ forgesinta patoso refreŝige efikis al li. La moderna poezio kelkfoje forgesas la enhavajn radikojn pro tro multaj „se" kaj „tamen". La aŭtoro transdonas al ni memkonscion, prezentante la himnon al la homo kaj al ties ter-patrino, kaj samtempe li lerte esprimas la premantan maltrankvilon pri la estonto de la homaro. Li verkas parte en liberaj, parte en rimitaj versoj. La tradukinto kreis poemojn kun rimitaj kaj altkvalite ritmaj trajtoj. Kelkaj strofoj tiel altvaloras, ke oni sentas la emon parkerigi ilin, ekzemple kelkajn versojn el „AMO":

Mi ekamis kun tia pasi',/
ke blindigis min nokta ĉiel',
perdis vojon mi en Galaksi',/
kaj eksentis min ie sur stel'.
Tuta mondo ridegis en ĝoj',/
ke mi restas sur stelo sen fin',
kaj mi pensis, laŭ laktvoj'/
mi revenus denove sur ĝin,
sur la teron, sentatan de mi/
en la brusto kun batoj de l'kor'.
Teran ĉarmon en sonĝa vizi'/
renovigis fidela memor'.

La eldonaĵon ornamas ilustraĵoj en formo de lignogravuraĵoj tre belaj far la popola artisto de Litova SSR Stasys Krasauskas (1919—1977). Tiel la libro aspektas kaj vere estas elstara donaco.

Michael BEHR

Kucharz, E. J.: Malgranda medicina vortaro Esperanta — angla — latina — pola — germana — franca — rusa. Silezia Medicina Akademio, Katowice 1985. Du volumoj, 484 paĝoj.

En seplingva vortaro ĉio estas sepobla: sep antaŭparoloj, ĉiuj komenciĝantaj per la sama greklitera citaĵo malkorekte supersignita kaj tradukita. Nur la bibliografio estas sufiĉe internacie komprenebla kaj pro tio ne en sep paraleloj. Inter 44 fontlibroj estas 8 Esperantlingvaj. Sekvas nun 2207 Esperantaj terminoj, ĉiuj kun la ses tradukoj nacilingven. Tiu ĉefparto ampleksas 227 paĝojn kaj plenigas la unuan volumon. Difinoj mankas, sed ili estas en medicina vortaro eble pli malhaveblaj ol en kelkaj aliaj branĉoj. Ne necesas por kuracisto difini sternumon, kolelitiazon, endoskopon ktp.
La dua volumo enhavas ses nacilingvajn partojn, kies laŭalfabetaj vortoj indikas per nombroj al la 2207 terminoj de la unua volumo. La germana parto ekzemple nur havas 37 paĝojn. Tio estas malavantaĝo de plurlingvaj vortaroj: ili estas tre dikaj, postulas multe da spaco en la bretaro, malŝparas paperon kaj kostas multon. Avantaĝoj estas la uzeblo en pluraj landoj kaj la vendeblo tien. Oni povas kompari la diverslingvan vortuzon kaj traduki publikaĵojn el diversaj landoj. Sed pro tio enestas tro malmulte da vortoj. 2207 terminoj, inter ili kelkaj sinonimoj, tute ne sufiĉas!
La germana parto enhavas preserarojn (Adenozin-, Aneleptikum-, anhalted — kiu havas en la ĉefparto la germanan sinonimon „langwellig" por longedaŭra, pfifend, Klitzler, Blasenspielung ktp.), erarojn kiel „coronaria Arteria"; komoj mankas inter du vortoj aŭ inter substantivo kaj sekva adjektivo. Malofte troviĝas estinta ortografio („Defect"), sed enestas ankaŭ malnovaj, apenaŭ plu uzataj vortoj.
Fine sekvas listo de 42 sufiksoj kaj 49 prefiksoj. La grekliteraj formoj ne necesus, precipe ĉar ankaŭ tie troviĝas mankoj kaj eraraj de akcentoj.
Unu celo de la libro ŝajnas esti, propagandi Esperanton enigante ĝin en plurlingvan medicinan vortaron (unualoke!) kaj skizante la historion de ĝia apliko en medicino (en la antaŭparolo). Sed apud la grandaj poliglotaj vortaroj kiel tiuj de Złotnicki kaj de Arnaudov ĝi do imponas tro modesta.

d-ro P. W. Ruff

Mario Simondetti: Kiamaniere distingi la fungojn? Come distinguere i funghi? Tradukita el Esperanto en la italan de Giovanni Barbieri. Edizioni Gabrielli 1986 (loko de la eldonejo?), 62 p., 3 p. ilustraĵoj

Temas pri tre konata libreto pri distingado de fungoj, kiu aperis unuan fojon 1961. Nun ĝi reaperis kun paralela itallingva teksto. La libreto estas kvazaŭ algoritmo konsistanta el 66 ŝtupoj de distingado. Trairante ĉi-tiun algoritmon oni diversloke trovas la koncernan fungon kun la priskribitaj ecoj. Por fungoŝatantoj tre utila libreto?

D. B.

Volumo pri Hristo Popov

Život, otdaden na cvoja naroda. Jubileen sbornik 120 godini Hristo Popov. Red. Nikola Niudov, Ivan Stojanov, Olga Cankova. Veliko Tarnovo 1985, 165 p.
La 12an de aprilo 1985 en Veliko Tarnovo okazis sciencpraktika konferenco pri la vivo de la bulgaro Hristo Popov, okaze de la 120a datreveno de lia naskiĝo. Popov estis popola instruisto, sociaganto, publicisto, popola kuracisto kaj pioniro de Esperanto. 18 referaĵoj aŭ studoj prilumas la ampleksan agadon de Popov, kiu estis unu el la unuaj gravaj bulgaraj esperantistoj. La bibliografio de la verkaro de Popov entenas 143 titolojn. Ĉiun artikolon sekvas Esperanta resumo.

—e

Ni publikigos nur tajpitajn koresponddezirojn!

Brazilo

Juna esperantisto planas biciklan vojaĝadon tra la mondo por diskonigi pacon, puran naturon kaj Esperanton! Li esperas gastamajn helpojn de ĉiuj: Aleksandro Carneiro, str. Sao Vincente De Paulo, s/n, **44150 Santa Barbara — Bahia**

Bulgario

Komencantino, 39j. flegistino, dez. kor. tutmonde: Veselina Krasinova, **7015 Ruse,** Druschba 3 bl. 10 vh. Š p. k. 18

Boris Angelov, **4700 Smoljan,** Bul. „Lenin" 70, Bl. 19, Ap. 14, dez. kor. pri abelkulturo

GDR

Studento dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Gerhard Wendlandt, **1156 Berlin,** Storkower Str, 215, Pf. 286

Fritz Habermann, Herkomerstr. 10, **Berlin-Treptow 1, 1193,** dez. kor. tutmonde pri vojaĝoj, literaturo, E-movado, kol. pm

Gejunuloj de la 6a ĝis 9a klasoj dez. kor.:

— Anett Möller, Karl-Marx-Str. 25, Pf. 96, **Warin 2723**
— Hagen Schnauß, Pf. 9, **Warin 2723**
— Beate Griese, Seeblick 8, Pf. 957, **Warin 2723**
— Nils Pfützner, Fritz-Reuter-Pl. 25. Pf. 351, **Warin 2723**
— Rene Griese, Seeblick 6, Pf. 964, **Warin 2723**
— Franziska Bomke, Mühlenbruchstr. 28, **Warin 2723**
— Anne v. Fircks, Burgstr. 3, **Warin 2723**

23j. pedagogo dez. kor pri muziko, literaturo, filmo, plantoj, bestoj, vivo en aliaj landoj; Eckhard Rohde, Am Markt 6, **Bad Doberan, 2560**

26j. laboristo dez. kor. tutmonde, int. pri biciklado, kosmoesploro, E-movado, kol, bk, pm: Ralf Lüdtke, August-Bebel-Str. 18, **Biesenthal 1296**

Brigitte Binder, Max-Herm-Str. 23, **Brandenburg, 1800,** dez. kor. tutmonde pri literaturo, kol. pm

Hungario

20j. studento de Muzika Altlernejo dez. kor. kun esp. gemuzikistoj el GDR. Ludas violonĉelon: Mario Machlik, **7400 Kaposvar,** Léva köz 2. III./4.

51j. oficistino dez. kor. pri literaturo, turismo: Katarina Ignáth, **4026 Debrecen,** Honvéd u. 3. II. 6.

40j. bazlerneja instruisto dez. kor. kun germana familio pri politiko, ekonomio, pedagogia metodiko, turismo: Karlo Balla, **2100 Gödöllö,** János u. 1.a

Kubo

Gustavo C. Monales, Dandel n-ro 209, e/n. lobos y Barrutia. Kpto: D'Beche-Gbcoa 11, **Habana,** dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk, pm, revuojn

Pollando

22j. teknikisto dez. kor. tutmonde pri pentroarto, fotoarto, teatro: Jolanta Babiarz, **57-200 Zobkowice** si, str. Kósciuski 5'2

Komencantoj, 18 — 60j. dez. kor. tutmonde p. ĉ. t. Bv. skribi al:
Polski Zwiazek Esperantystów, Koło Nr. 2 „Homa Kompreno", przy ZR „DIORA", **58-200 Dzierzoniów,** ul. Swidnicka 47

Soveta Unio

Inĝ. 60j., dez. kor. tutmonde pri la vivo en XXIa jc., pri „eberna paco" — permanenta paco, E-movado: Viktor Petr Ĉernikov, **257 028 Ĉerkasy,** Engelsa 241/1-63

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16